MARTO / APRILO 1990

ISSN 0150-5823

87

(105)

**Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista**

Redaktejo: Esperanto * Cargue Sac, F 47470 BEAUVILLE

Unu n-ro : 8 FF. Abono por 1990 : 40 FF ĝirotaj al :

**CERCLE AMICAL ESP. AGENAIS, pĉk 3371 74M Bordeaux**

mencii same sur banĉekoj, dankon! Nia tel.: 53.95.40.26



# AMIKOJ KAJ MALAMIKOJ DE L' UNIVERSALECO

*Nek identigo, nek religio ! La idealismo de Krishnamurti suferas tiujn ĉi tempojn !*

*Kvankam ni scias vere, ke internacigo kaj ĉefe sennaciismo de la rilatoj inter la homoj povus alporti solvon al ties malbeno kaj kvereloj per fortega solidareco, sukcesas kontraŭa fenomeno. Naciismo neniam mortis. Male, ĝi estas pli kaj pli ŝatata. Ĝi estigas multajn murdojn kaj masakrojn kaj, bedaŭrinde, religioj neniam estas tre malproksimaj !*

*Eventoj, kiujn ni ĉiutage sekvas, daŭre deklaras Krishnamurti prava :*

nek identigo, nek religio, aŭ flugas la sango kaj forkuras la amo.

Feliĉe ekzistas movadoj, kiuj plu laboras por bono kaj frateco inter la homoj : "Medicinistoj sen landlimoj", "Amnestio Internacia", "UNICEF"...

Ni ne forgesu, ke tio, kio grandigas la animon, estas amiko de l' universaleco kaj male, tio, kio mallarĝigas ĝin, estigas malamon.

Domaĝe estas, ke civilizita homo ne povas aŭ ne volas rezigni siajn animalajn maltrankvilojn, inter kiuj superregas defendo de la teritorio. Sekve, li ne povas preteksti konservadon kaj postvivon de la specio por pravigi sin.

Evoluo de l' infano dependos de la gvidado, kiun la gepatroj donos al lia menso. Fariĝinte plenkreskulo, homo vojiros laŭ propra elekto. Se li tro taksos sin mem, ne estos facila vojo, ĉar li ne atingos homan kunecon ; li ne ekkonos veran feliĉon nek vivsignifon.

Dio ordonis al Abrahamo forlasi siajn landon kaj familion por iri en fremdan landon.

Antaŭ du mil jaroj, Kristo proponis realigi universalecon pere de amo, sed por atingi hipotezan ĉielan reĝolandon. Epitekto konsilis elpatriiĝi por serĉi saĝecon : "Rezignu viajn landon, patrion, amikojn, familion."

Nuntempe Davy sendas al ni interesan mesaĝon pere de sia libro **"Vojplano por serĉado de l'eterneco"** : "Moderna homo devas abolicii ĉiajn limojn : politikajn, naciajn aŭ religiajn, aŭ li pereos. Pri kiu morto temas? Pri tiu de vera timemo, kiu ne havas kuraĝon por vivi sian veran destinon, kaj ankaŭ pri tiu de materialisto, kiu akceptas suverenecon de l' "Princo de l'mondo". Rifuzi sian tempon, tio estas montri malaŭdacon. Ĉiu regresa inklino senmovigas".

Krishnamurti pravis !

Sed tiuj belaj teorioj tiel diferencas je ĉiutaga realo! Se staras kampo, kie homo ne multe evoluis, ĝi estas ja tiu de sennacieco. Ofte lia vidkapablo ne flugas ekster lian vilaĝon, urbon aŭ regionon. Jen la halto de l'vojaĝo de lia menso, kiu komenciĝis en lia lulilo.

(fino sur p.51)




CERCLE AMICAL ESP. AGENAIS
Cargue Sac
F-47470 BEAUVILLE

poŝtkonto :
CERCLE AMICAL ESPERANTISTE AGENAIS
3371 74 M BORDEAUX

Krom la revuo **Laŭte!**, Amika Esperanto-Rondo Aĝenia eldonas broŝurojn por propra broŝura serio, por la Broŝurservo de SAT aŭ por aliaj personoj aŭ asocioj.

## ELDONADO

Laŭ la enhavo de la manuskriptoj kaj la deziroj de la petantoj A.E.R.A. povas eldoni laŭ tri diversaj formuloj :

**1. En la kadro de SAT-Broŝurservo/Laŭte! :** La broŝuroj de ĉi tiu serio estas eldonataj iel kooperative per propra kaso de SAT-BS. Ili estas mendeblaj rekte al la BS aŭ al la kunlaborantaj libroservoj, aŭ riceveblaj aŭtomate per abono (vd. poste).

**2. La aŭtoro/tradukinto pagas mem** la eldonkostojn kaj mem zorgas pri disvendado de sia broŝuro.

3. Se la enhavo de la broŝuro tion pravigas, **parton de la eldonkvanto povas pagi kaj disvendi mem la broŝurservo,** enigante la broŝuron en la serion ricevotan i.a. de broŝurabonantoj kaj de kutimaj kunlaborantaj libroservoj.

## MENDOJ AL LA BROŜURSERVO

La prezoj, en francaj frankoj, inkluzivas la afrankon por minimume **120**-franka mendo. Por malpli ol **120**-franka mendo : pagi la realan afrankon post ricevo de fakturo.

Libroservoj, plurjaraj abonantoj de **Laŭte!** (monprovizantoj A) kaj broŝurabonantoj (monprovizantoj B) rajtas 20% da rabato, kiam ili mendas por almenaŭ **120 FF**.

## ABONO AL LA BROŜURA SERIO / LAŬTE!

Kiu deziras ricevi aŭtomate **Laŭte!** kaj, kun 20%-rabato, ĉiujn novajn broŝurojn kaj tiel kontribui al bona plufunkciado de la afero, tiu monprovizu per almenaŭ **120 FF**. La abono validos ĝis elĉerpiĝo de la monprovizo. Pri la stato de sia "konto" la monprovizanto ricevas informon ĉiun jarfinon kaj ĉe baldaŭa elĉerpiĝo. Ne-reprovizado signifas aŭtomatan rezignon de la abono.

## LISTO DE SAT-BROŜURSERVO (jan. 9?)

| Mendkodo. Titoloj (Aŭtoroj) | Prezo en FF |
|---|---|
| Aa. La antaŭvenantoj de Anarkiismo (Armand) | 4 |
| AA. La Aperoj de Ahasvero (Han Riner) | 20 |
| AL. Alvokoj al la homa konscienco (APJR) | 6 |
| AN. Nia angorplena socio (Milan Ŝimeĉka) | 3 |
| AO. Anarkio kaj organizo (Malatesta) | 4 |
| AP. Amo per proverboj (Azevedo) | 1,50 |
| AR. Argentina Noveiaro (18 noveloj) | 20 |
| BA. Bazoj de Anarkiismo (Balkanski) | 20 |
| BP. Legendo pri la bela Pekopeno (V.Hugo) | 15 |
| BU. La racia kaj ateista budhismo | 4 |
| ĈI. Ekologio : ĉu ideologio ? (W. Günther) | 3 |
| ĈS. Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? (Lanti) | 6 |
| DI. Kiel diri...? (Lentaigne), E-frazeologio | 25 |
| DU. Durruti, simbolo de la hispana revolucio (Pario) | 3 |
| EA. Esperanto in 24 pages (angla) | 1 |
| EB. Esperanto de Base (2 folioj) | 1 |
| EL. Elekto de tekstoj de Bakunin | 10 |
| ES. Por ekologia socio (Murray Bookchin) | 12 |
| ET. Etiko I (Kropotkin) | 12 |
| EV. Eduko kaj vivsignifo (Krishnamurti) | 4 |
| FA. Konstrui fajron (Jack London) novelo | 4 |
| FE. Esprimaro Franca-Esperanta (Bourgois) | 45 |
| FI. Laŭ la fluo de l'interparolo (Bourgois) Esp./Fr. | 8 |
| FZ. Filozofio Zoologia (Lamark) | 20 |
| GE. Abrégé de grammaire esp-o (Lentaigne) | 7 |
| GR. Grammaire & Esperanto (Lentaigne) | 5 |
| HP. Humanitaristaj Principoj (Eugen Relgis) | 3 |
| IE. Initiation à l'Esperanto (An Kaŭ) | 5 |
| IM. Individuista Manlibreto (Han Riner) | 4 |
| IN. Individualisma socialismo de A.R.Protschowsky | 2 |
| JA. Jaro 2000 (H.Muller) disdona ekonomio | 35 |
| KA. Kancero kaj Ekologio (Maurice Touchais) | 15 |
| KB. Kie brulas, ĝentlemanoj? (poemaro) Buchowski | 18 |
| KD. La Krimoj de Dio (Sébastien Faure) | 4 |
| KE. La Kvina Evangelio (Han Riner) | 15 |
| KF. Kontraŭflue (Valo) | 10 |
| KI. El la kara infaneco... (Valo) | 12 |
| KP. Katastrofplano pri Fessenheim + Wyhl | 5 |
| KV. Kvardek paŝetoj al plua posedo (legolibro) | 10 |
| LK. La Konflikto (Le Dantek) + Dubi (Alain) tr. Lanti | 20 |
| LL. Leteroj de Lanti (ĝis 1937) | 45 |
| LM. La Mondo ne havas atendejon (Dekker) | 15 |
| LR. La Ribelo (Joseph Roth) romano | 18 |
| ME. La Mistero de nia surtera vivo (Archdeacon) | 4 |
| MN. Ĉu militista defendo estas kredebla? (Lasserre) | 6 |
| MS. Memvola Servuto (La Boétie) | 4 |
| MV. Mia vivo. Artikolaro. Poemaro (Bartelmes) | 10 |
| NE. Naciismo kaj Esperantismo (S.Aarse) | 8 |
| NC. Naciismo (Lanti) | 12 |
| NI. Nia Individuismo (E. Armand) | 4 |
| NL. Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo (Leo Polak) | 3 |
| NO. Nova Paradigmo en Psikologio (Feldman) | 35 |
| PA. Pensoj de PASKALO (ekstraktoj) | 15 |
| PF. Proverbaro Franca/Esperanta + Esprimoj sankciitaj de l'uzado (Bourgois) | 12 |
| PL. Esperanto kaj Literaturo (R.Laval) | 3 |
| PN. Politika Neperforto (M.A.N.) | 8 |
| PR. La Poemo de Rodano (Frederi Mistral) | 30 |
| PS. Psikotransformismo (Ergoto de Bonaero) | 4 |
| PT. Piramido de l' Tiranismo (Domela Nieuwenhuis) | 3 |
| RA. Revolucia registaro. Pariza Komuno (Kropotkin) | 6 |
| RO. Rompoj (A.Jacquard) | 4 |
| SJ. Sepdek jaroj sub la verda stelo (Valo) | 12 |
| SR. Les 16 règles commentées (R.Laval) | 3 |
| SS. Sindikatismo. Sovetoj (A.Pannekoek) | 4 |
| ŜG. La Ŝtona Gasto (Michel Duc Goninaz) (teatraĵo) | 5 |
| TD. Tiel diru! (Lentaigne) supl. de DI por francoj | 25 |
| TP. La Turo de l' Popoloj (Han Riner) romano | 20 |
| US. Unueco super prokreda dividiĝo (Leo Polak) | 3 |
| VH. Ĉu ni vere helpas la trian mondon? (Roberts) | 10 |
| VI. Veraj Interparoladoj de Sokrato (Han Riner) | 20 |
| VL2. Verkoj de Lanti 2. (3 semajnojn en Rusio Tro Plena Gramatiko, Diskutejo, Epiloge) | 20 |
| VL3. Verkoj de Lanti 3. (Artikoloj, paroladoj kaj ekstraktoj el leteroj de 1937 ĝis 1946) | 20 |
| VO. Vortoj de Kamarado E. Lanti | 20 |
| VT. El verkoj de Leo Tolstoj (Patriotismo kaj registaro, Al politikistoj, Ĥodinka, Ne mortigu!) | 7 |
| ZH. La Zamenhofa Homaranismo (A. Caubel) | 4 |



## LIBRO-SERVO de AMIKA E-RONDO AĜENIA

Cercle amical esp. agenais
F-47470 BEAUVILLE
pĉk: 3371 74 M Bordeaux

Nia libro-servo disvendas ĉefe la eldonaĵojn de SAT, de SAT-Amikaro, kaj ĝenerale de membroj de nia asocio. Ni celas provizi ĉefe niajn abonantojn kaj la vizitantojn de nia renkontiĝejo "Moulin de Beauville" per servo funkcianta la tutan jaron, eĉ dum ferioj.
Atentu! La prezoj de la libroservo, en francaj frankoj, **ne** entenas la afrankon. Pagi post ricevo de fakturo.

**Unua listo de disponeblaĵoj** (jan.1990)

| | |
|---|---|
| Junulkurso kun suplemento por francling vanoj | 48 |
| Diskoserio de Junulkurso (aŭ Kasedo) | 45 |
| Nouveau cours rationnel (bindita) | 60 |
| Kasedo por Nouveau Cours Rationnel | 45 |
| Dictionnaire pratique (F-E kaj E-F) | 80 |
| Dictionnaire de poche (F-E kaj E-F) | 20 |
| Grand Dictionnaire E-F (Waringhien) | 90 |
| Plena Vortaro | 75 |
| Plena Ilustrita Vortaro kun suplemento | 340 |
| Suplemento al P.I.V. (aparta eldono) | 30 |
| Une Humanité, une Langue (S.Glodeau) | 10 |
| Sennaciece tra nia mondo (G.R. Ledon) | 60 |

Kasedoj de **NIKOLIN'**
* Invito al ĝojo 70 - Jula Lando 70 - Nur per amo 70
Disketo de **NIKOLIN'** : La Esperanto-Knabino 40

Vos Chaînes (Docteur Jacques) 70

| | |
|---|---|
| **Aliĝo** al A.E.R.A. por 1990 : | 20 |
| **Abono** al la revuo **Laŭte!** por 1990 : | 40 |
| **Abono** al **Laŭte!** por 1990 kaj 1991 : | 100 |

*JAKELINO...*

## AL KAMARADO LEDON

*Tre miris mi, kiam mi ricevis la ekzempleron de via libro "**Sennaciece tra nia mondo**", kiun vi dediĉis al mi. Mi ne atendis, ke vi povas paroli pri la sendependeco de la penso de homo tiom mistika, kiom mi estas. Tio tre surprizis min. Kaj vi ja scias, ke mia unua reago estis: "Ankoraŭ iu iluminito, kiu sendas al mi sian sanktan libron!"*

*Mi legis vian libron, ĉar interalie kristanoj aliĝas al la principo : "agu kun aliaj homoj tiel, kiel vi ŝatus, ke ili agu kun vi". Nu : jam okazis, ke al homoj, kiuj ne pensas kiel mi, mi proponis dialogon. Tia dialogo ne ĉiam eblis, tamen plurfoje okazis, ke homoj, al kiuj mi klarigis, ke ili eraras pri sia pensmaniero, poste fariĝis amikoj, kun kiuj mi plezure korespondas. Do mi pensis : "Ĉar mi mem iam trudis mian prozon al Valo, mi ne povas rifuzi, ke sian prozon trudu al mi Garolo." Do mi decidis iam legi vian libron, kvankam mi ne metis ĝin en la kategorion "urĝa".*

*Sed, ĉar ofte sennaciistaj dogmoj min nervozigas, mi atendis por legi vian libron, ke mi estu iom serena. Nu, sereneco venis al mi, kiam mi eksciis, ke GDR malfermas sian okcidentan limon. Vidu, mi emas privatigi mondajn (aŭ eŭropajn) problemojn. Mi ne nur solidariĝis kun la pola sindikato Solidareco, sed havis hejme mian propran polan opoziciulon. Same, la malfermo de la fera kurteno estas por mi ĉefe la okazo reaŭdi pri mia GDR-a leteramikino, pri kiu mi nenion plu eksciis jam de 1976. Dank'al la telefona informservo mi eksciis la adreson de viro, kiu loĝas en la sama urbeto kaj havas la saman, ne kutiman en Germanio, familian nomon. Sendinte registritan leteron al tiu viro, kiu eble estas ŝia patro, mi estis invadita de sento de profunda sereneco.*

*Mi legis vian libron dum semajnfino, dum kiu apenaŭ eblis ŝalti televidilon, ĉu al francaj ĉu al FRG-aj programoj, sen ricevi bildojn pri la detruata muro de Berlino. La libron mi komencis sabate. Dimanĉe matene mi veturis al Karlsruhe por kvakera adorkunveno. Mi plu legis la libron en la trajnoj al Karlsruhe, poste en la stacidomo*

*en Karlsruhe, kaj poste en la reventrajno. Mi atingis mian hejmon sen esti fininta la libron. Vespere mi rigardis informan filmeton pri la rilatoj inter blankuloj kaj nigruloj en Afriko dum la kolonia tempo. Post tiu elsendo mi finlegis la libron.*

*Do jen la etoso, en kiu mi legis tiun libron. Kiel vi scias, mi ne estas raciisto, do mi ne entreprenos racie ekspliki al vi, kial mi dimanĉe ellitiĝis pli frue, ol mi kutimas semajne, kaj veturis 70 km-ojn per trajnoj por dum unu horo sidadi silente kun aliaj homoj. Fakte estis nur unu interveno dum tiu adorkunveno, kaj ĝi rilatis al la detruata muro de Berlino.*

*Same kiel Valo iam malkovris, ke miaj ideoj, kvankam ne tute samaj kiel liaj, tamen estas malpli malproksimaj de liaj, ol li supozis, same mi, leginte vian libron, konkludas, ke viaj ideoj estas pli elteneblaj, ol mi timis.*
*Tio ne signifas, ke vi konvertis min, kompreneble!*
*Via rasteorio estas ja individueca kaj originala, sed ĉu sufiĉas kontraŭdiri siajn samtempulojn, aŭ siajn samasocianojn, por pruvi sian propran pravecon? Neniam metinte la piedojn ekster Eŭropon, mi ne kompetentas por solvi la problemojn de la Tria Mondo.*
*Sed pri eŭropanoj mi ja rajtas paroli. Nu, inter anglosaksoj kaj latinidoj, la rasa diferenco ne estas tre granda. Tre verŝajne estas interne de la nigra raso pli grandaj diferencoj, kiujn malbone rekonas okuloj de blankuloj. Inter anglo-saksoj kaj latinidoj ekzistas kultura diferenco : plej ofte, anglo-saksoj estas protestantoj, kaj plej ofte latinidoj estas katolikoj. (Mi mem ne plu estas katolika, kaj neniam estis protestanta.) Eble estas pia devo de ateistoj zorge ignori tian diferencon. Sed mia propra sperto estas, ke en protestantaj regionoj ateistoj estas pli malmultaj, kaj pli inteligentaj, ol ateistoj en katolikaj regionoj. Do mi povus skribi libron pri la tezo, ke kultura diferenco estas pli grava, ol rasa.*

***

*Se via rasteorio estas originala, male vi tute ne liberigis vian menson el la konfuzoj, sur kiuj baziĝas la sennaciismo de Lanti, nek el la plej gurdata el ĉiuj ateistaj dogmoj.*



**LA KONFUZOJ, SUR KIUJ BAZIĜAS LA SENNACIISMO DE LANTI**

** Pri la kutima ĉe francoj kutimo inter ŝtato kaj nacio jam skribis en L! Oksana kaj mi, do ne utilas rediri tion, kion ni jam diris.*

*La detruata muro de Berlino disigis ne nur samnacianojn, sed eĉ samurbanojn. Tio pruvas, ke murojn konstruas ne nur naciismoj. La ismo, laŭ kiu ne plu devus ekzisti ŝtatoj jam havas nomon : anarkismo. La ismo, laŭ kiu devus malaperi ĉiuj kulturoj minus unu, nomiĝas : sennaciismo. Estas diferenco inter tiuj ismoj. Se anarkistoj akceptus, ke mi rajtas ne kredi ateismajn dogmojn, mi eble (sed ne certe) estus anarkisto. Sed sennaciisto mi neniam estis, nek nun estas.*

** La sennaciisma propagando baziĝas sur vortkonfuzo :*
*Lanti nomis "naciismo" iun ajn ismon, kiu akceptas, ke ekzistu diversaj nacioj. T.e., laŭ tiu difino iu ajn ismo estas naciismo, escepte de sennaciismo mem. Nu bone, efektive, laŭ la gramatikaj reguloj de Esperanto, Lanti rajtis nomi "naci-ismo" iun ajn ismon, laŭ kiu naciaj kulturoj rajtas ekzisti. Tio estas la larĝa difino de la vorto naciismo.*
*Sed en PIV naciismo havas alian difinon :"politika doktrino, kun mistika bazo, laŭ kiu la nacia tradicio estas ĉiam preferinda kaj la naciaj ambicioj ĉiam pravaj kontraŭ tiuj de iu ajn alia nacio."*
*Firuze Lanti ĉiam ĵonglis per ambaŭ difinoj de la sama vorto por kredigi al la naivaj esperantistoj, ke eblas nur du sintenoj :*
*- aŭ oni estas mistikulo, laŭ kiu la nacia tradicio estas ĉiam preferinda kaj la naciaj ambicioj ĉiam pravaj kontraŭ tiuj de iu ajn alia nacio,*
*- aŭ oni estas mistikulo, laŭ kiu la verdstela tradicio estas ĉiam preferinda kaj la esperantistaj ambicioj ĉiam pravaj kontraŭ tiuj de iu ajn alia lingvo.*
*Vi mem estas viktimo, kaj daŭriganto, de tiu ĵonglado : se homo volas paroli vaske, vi tuj supozas, ke li estas mis-*

tikulo, laŭ kiu la vaska tradicio, ktp. Mi ankoraŭ atendas, ke sennaciisto bonvolu racie respondi mian demandon : kiel la franca lingvo estas pli sennacieca ol la vaska?

Mi amas la francan lingvon kaj la francan kulturon. Mi ne amas mian naskiĝlokon Saint-Denis, ĉar mi ĝin forlasis kun 3 jaroj. Mian infanaĝon mi travivis inter loĝturoj en Bagnolet. Ĉar vi konas la lokon, diru al mi, ĉu eblas mistiki pri Bagnolet ! Ĝuste ĉar mi amas mian nacian kulturon, mi konsentas al ĉiu homo, eĉ interne de la franca respubliko, la rajton ami sian.

Ĉu tio estas naciismo ?

Mi tute ne kredas, ke la franca tradicio estas ĉiam preferinda kaj la francaj ambicioj ĉiam pravaj kontraŭ tiuj de iu ajn alia nacio (ekzemple la kanaka). Do mi estas nek sennaciisto nek naciisto. Do, laŭ sennaciista mitologio mi simple ne ekzistas. Ĉar mi konsentas al strasburganoj la rajton paroli la alzacan dialekton, kvankam mi mem ĝin malperfekte komprenas, sennaciistoj inventi la legendon, laŭ kiu mi estas "alzaca etnaciisto" kaj "strasburga provinculino". Eĉ amikino, tute ne sennaciista, diris al mi, ke mia patro estis germano.

Do delonge mi scias, ke la imagpovo de sennaciistoj neniel malsuperas tiun de la plej fantaziaj inventintoj de religiaj mitologioj.

Dek-okjara mi fariĝis mondcivitano, kaj samtempe mi lernis Esperanton. Mi tiom bone kiom vi komprenas, kio estas tutmonda kulturo. Sed laŭ mia opinio ĝi povas kunekzisti kun etnaj kulturoj. Mi konsentas, ke ne plu ekzistu ŝtatoj. Se ŝtatoj ne plu ekzistus, ankaŭ ne plu ekzistus landlimoj, stampoj, ktp. Sed male de tio, kion kredas francoj, ŝtato ne estas nacio. La konfuzo estas tipa ĉe francoj, tial en Francio kreiĝis sennaciismo. Ne mi, sed brita sennaciistino, iam skribis en **Sennaciulo**, ke francoj estas la plej bonaj sennaciistoj. Nu, pri tiu tipa trajto de nia nacio mi rezignis !

Kompreneble, se ne ekzistus nacioj, ne ekzistus naciismoj. Kaj se ne ekzistus seksoj, mi ne estus seksperfortita.

***



La plej gurdata el ĉiuj ateistaj dogmoj estas la aserto: evidentas, ke religioj havas kiel ĉefan kaŭzon la homan mistikemon kun bezono de klarigoj pri ĉio ekzistanta, inkluzive pri vivo kaj morto. Kio evidentas, tio estas, ke tiun aserton raciistoj inventis projekciante sur dikredantojn tipajn trajtojn de sia propra menso, ĉar :

- mistikemo estas tiom granda ĉe ateistoj, kiom ĉe dikredantoj (se vi dubas pri tio, iru, laŭ via prefero, ĉu al ŝtato regata de ateistoj, ĉu al solena malfermo de SAT-kongreso)
- tiuj, kiuj bezonas klarigojn pri ĉio ekzistanta, estas la raciistoj
- kiel rimedo kontraŭ la mortangoro pli taŭgas ateismo, ol katolikismo.

## TIUJ, KIUJ BEZONAS KLARIGOJN PRI ĈIO EKZISTANTA, ESTAS LA RACIISTOJ

Tiel la raciistaj verkintoj de PIV difinas la racion :
**tiu parto de la mensa strukturo, kiu servas al la homo, por malkovri k formuli la leĝojn de la universo k laŭ ili fabriki ilojn kaj maŝinojn**
PIV ilustras tiun difinon per jena frazo : la regado super la naturo okazis samtempe k paralele kun la kreskado de la racio en la homa menso. (kaj paralele kun la malkreskado de la amazonia arbaro, noto de Jakelino).

Evidentas, ke :
- raciismo estas la ideologio de la industria revolucio
- la ideo, ke homo devas regi la naturon, fontas el la Genezo.

Ĉu evidentas, ke la universo havas leĝojn? Tute ne! Kaj, eĉ se la universo havas leĝojn, ĉu evidentas, ke tiuj leĝoj devas kongrui kun la mensaj strukturoj de iu modesta mambesta specio vivanta sur iu modesta planedo de modesta galaksio, ie en la vasta kosmo? Ankaŭ ne. Sed raciistoj bezonas kredi, ke homo kapablas malkovri kaj formuli la leĝojn de la universo.

Iam mi demandis katon, ĉu la strukturoj de la kata menso estas tiaj, ke kato konas la leĝojn de la universo. Ĝi respondis "miaŭ!", kaj iris ĉasi musojn, dum mi iris

skribi aerogramon favore al torturato, kies sorton mi eksciis per Amnestio Internacia.

Se oni rigardas la historion de ideoj en Eŭropo, oni vidas, ke la nuntempa raciismo estas bastardo de la kredo al la granda horloĝisto (la dio de Voltaire) aŭ la arkitekto de la universo (la fundamento de framasonismo).

La fundamenta verko de raciismo estas la "Diskurso pri la metodo", kiun Kartezio skribis en la 17a jarcento kun la intenco racie pruvi la ekziston de Dio kaj la senmortecon de la animo. Tion scius Yves Peyraut, se li kutimus legi la librojn, kies legadon li konsilas al siaj gekamaradoj. Laŭ la sistemo de Kartezio, 2 plus 2 estas 4, ĉar Dio tion volas. Ĉar perfekta dio ne povas ŝanĝi sian volon, ankoraŭ morgaŭ 2 plus 2 estos 4, kaj tio eterne daŭros, ĉar tio estas leĝo de la universo. Kartezio plurfoje skribis, ke ateisto ne povas esti bona matematikisto.

Ankaŭ en la 18a jarcento la raciistaj filozofoj malgraŭ kelkaj esceptoj (kiel Diderot aŭ Condorcet) ne estis ateistoj, sed diistoj. Oni havas la prapatrojn, kiujn oni povas! Mi certas, ke la Diskurso pri la Metodo ne povus aperi en la liberpensa rubriko de **Sennaciulo**, ĉar ĝia respondeculino iam skribis al mi, ke ŝi ne akceptas kontribuojn de diistoj. Mi ne scias, ĉu la priskribon de kvakeroj, kiun Voltaire faris en siaj "**Filozofiaj Leteroj**", la PK de SAT rifuzus pro sia devo protekti la asocion kontraŭ religia prozelitismo.

Dum la Franca Revolucio, la usona diisto Thomas Paine, cetere filo de kvakero, skribis en "The Age of Reason" (la aĝo de racio), ke vera teologio ne estas la studado de la Biblio, sed la studado de fiziko, ĉar la leĝoj de la universo rezultas el la volo de Dio. Do kiuj bezonas ĉion scii pri la leĝoj de la universo? La raciistoj! Veraj teologoj, laŭ tiu raciista pensulo, estas la sciencistoj (en la 18a jarcento la vorto "fiziko" havis pli larĝan sencon, ol hodiaŭ).

Kaj efektive la rilato de hodiaŭaj raciistoj al scienco estas rilato de adoremuloj al sia dio. Scienco donos al ni



klarigojn pri ĉio ekzistanta. (se mi iam ilin trovos, mi legos la librojn de Comte).

Tamen, vivante 2 jarcentojn post Thomas Paine, mi scias ke :

- scienco alportas neniun certecon. Sciencistoj havas nur teoriojn. Tiom longe, kiom teorio kongruas kun eksperimentoj, la teorion oni konservas. Se eksperimento kontraŭas teorion, oni faras pluajn eksperimentojn, kaj laŭbezone ŝanĝas la teorion. Konsekvence, nenio estas definitive pruvita. Konsekvence, raciistoj, kiuj ion ajn kredas, kredas tion sen definitiva pruvo.
- sciencisto ne plu povas kompetenti pri ĉio. En la 18a jarcento, sama homo povis esti matematikisto, natursciencisto, fizikisto, filozofo, ktp. En la 20a jarcento, sciencisto scias multon pri sia fako, iom pri najbaraj fakoj, kaj tute nenion pri aliaj fakoj.

Do :

- raciismo estas la ismo de tiuj, kiuj volas koni la leĝojn de la universo
- bedaŭrinde scienco tute ne povas plene kontentigi tiun ilian bezonon.

Mi ne bezonas ĉion scii pri la universo. Mi estas malbona teologo : min neniam multe interesis matematiko, fiziko, kemio, astronomio aŭ natursciencoj. Mi preferas homsciencojn : historio, historio de ideoj, mitologioj, psikologio, sociologio, ktp. Mi preferas babili dum horoj (en angla lingvo) kun gotenburga stratkantisto, ol veturi 500 km sen paroli al iu ajn homo.

Ĉar ni estas tiel diferencaj, estas kompreneble, ke ni aliĝas al diferencaj ismoj. Raciismo tute ne taŭgas por mi. La dio de Kartezio ne estas la mia, kaj ankaŭ ĝiaj ateistaj bastardoj min ne allogas.

Iam la plej raciista el miaj 4 fratoj diris fiere : "Mi havas vivprincipon; mi kredas nur tion, kio estas pruvita. Mi respondis : "Pruvu, ke Sophie estas cia filino!" Lia reago estis : "Nu, jes, kompreneble, se temas pri sentimentoj..." Mi miregas, ke homo povas aliĝi al vivprincipo, kiu

ne aplikiĝas al sentimentoj. Ĉu sentimentoj estas malgrava, ignorenda parto de la homa vivo? Mi komprenas, ke raciismo taŭgas por teknikisto, inĝeniero (tia estas mia frato). Sed por homo tiom sentema, kiom mi estas, ĝi ne estas kontentiga. Mi estas homo, kiu bezonas ami kaj esti amata. Mi revas pri la "granda rondo familia". Maljustaĵoj min plorigas, kio foje donas al mi okazojn esti konsolata. Tial pli taŭgas por mia menso kulti al dio, kio estas amo, ol kulti al dio, kiu inventis la eternajn fizikajn leĝojn de la universo. (Ke la vorton dio oni ŝanĝas per la vorto racio ne ŝanĝas la fundon de la afero).

Ĝojinde, mi trovis religian societon, kiu havas nek dogmojn, nek ritojn, nek pastrojn. Kompreneble la ekzisto de tia societo ne kongruas kun la ateistaj dogmoj pri tio, kio ĉiam estas religioj, sed estas fakto, ke ĝi ekzistas. La unuan fojon, kiam mi skribis pri kvakeroj en **Sennaciulo**, iu ateisto atentigis min ke "ilia doktrino ne estas pli pura, ol la aliaj." Mi miris, ke homo, kiu riferencas al la racio, tiel malracie agas donante konsilon pri temo, kiun li ne konas. Se mi skribus al la sekretario de la franca societo de amikoj : "mi volas fariĝi membro, ĉar kvakeroj havas la plej puran doktrinon", li certe respondus : "ni ne povas cin akcepti tiom longe, kiom ci ne scias, kio estas kvakereco." Ĝojinde, ne al doktrino mi intencas aliĝi, sed al grupo de homoj, inter kiuj mi sentas min hejme. (Kompreneble, obei siajn sentojn ne estas raciista konduto!)

***

## KIEL RIMEDO KONTRAŬ LA MORTANGORO PLI TAŬGAS ATEISMO, OL KATOLIKISMO

Mi miras, ke inter la homoj, kiuj asertas, ke homoj aliĝas al religioj pro sia timo antaŭ la morto, troviĝas multaj homoj, kiuj iam estis katolikaj infanoj.

Hodiaŭ katolikaj infanoj lernas, ke Dio estas amo, ke li estas ilia patro, ktp, ktp. Sed tiel tute ne estis en mia propra infanaĝo.

Mi lernis ĉe la katekismo ke, se mi mortos inter peko kaj la konfeso de tiu peko al iu pastro, mi iros al la infero, se la peko estas morta, aŭ eble nur al la purgatorio, se la peko ne estas morta. Bedaŭrinde mi ne bone sciis, kiuj pekoj estas mortaj aŭ ne, kaj neniam aŭdacis demandi la sinjoron pastron, ĉu manĝi konfitaĵon malantaŭ la dorso de sia patrino estas morta peko aŭ ne. Mi tute certis, ke kvereli kun gefratoj estas morta peko. Sed mi defias vin trovi knabinon kun 4 fratoj, kiu sukcesas trapasi unu semajnon sen kvereli kun almenaŭ unu el ili! Foje mi pensis : "Ja Jesuo estis modela infano, sed li ne havis gefratojn, kaj lia patrino kaj adopta patro ambaŭ estis gesanktuloj. Tio ne estas justa!", kaj tuj poste mi konsciis, ke mia ĵusa penso estas sakrilegio, kio kompreneble ne simpligis la problemon.

Ĉar ne eblas trapasi unu semajnon sen morta peko, mi devus ĉiusemajne konfesi al pastro, ke mi denove kverelis kun la fratoj. Sed miaj gepatroj mirus, se mi volus pekkonfesi ĉiusemajne, do mi ne aŭdacis tion peti. Rezulto : mi preskaŭ konstante estis en stato de morta peko. Por 8-jara infano ne ĉiam estas klare, kiuj malsanoj estas mortigaj, kiuj ne. Do, se mi diris al Alain : "Ci estas idioto", kaj la morgaŭan tagon devis kuŝi pro gripeto, mi ne certis, ĉu la gripeto estas mortiga malsano. Se jes, mi iros al la infero, krom se pastro venos, por ke mi povu diri al li, ke mi denove insultis Alain. Sed se mi postulus de la gepatroj, ke ili venigu pastron, certe ili ne volus.

Krome, mi imagis, ke la Lasta Juĝo nepre okazos nokte, kaj pro tio timis ekdormi. Do regule mi konfesis miajn pekojn al pastro. La unuan fojon, tio estis terura. La preĝejo estis tute malluma, kaj mi devis enfermiĝi en iu skatolo kun viro nigre vestita, por diri al li, ke mi manĝis konfitaĵon kaj asertis, ke Alain estas idioto. Terura sperto por juna infano! Sed aŭ tio, aŭ la infero.

Iom poste malstabiliĝis miaj konceptoj pri bono kaj malbono. Ĝis nun, mi supozis, ke bono kaj malbono kongruas kun la ordonoj kaj malpermesoj de gepatroj kaj instruistoj. Ĉar mi estis bona lernanto, mi preskaŭ neniam bezonis kopii la taskon de kamarado. Male, mi ne malofte lasis kamaradojn kopii miajn taskojn, kio kompreneble estas same malpermesita. Iam ŝanĝiĝis la estro de la paroko de sanktaj Leu kaj Gilles en Bagnolet. Al la nova

parokestro mi konfesis, ke mi donis mian taskon al samklasano, por ke li ĝin kopiu. La pastro diris : "Sed tio ne estas peko! Kredeble vi tion faris pro karitato." Nu : se la leĝoj de Dio ne kongruas kun la reguloj de la laika lernejo, kiel povas elturniĝi kompatinda franca katolika infano ?

Tion spertinte, mi konsilas al iu, kiu timas morton, ke li nepre ne fariĝu katoliko.

Ke ateismo tute taŭgas por homo, kiu timas morti, jen kio ne estas evidenta. Per **Laŭte!** mi eksciis kun miro, ke, kiam ateisto estas mortanta, karitata ateisto venas al li por reciti la ateistan kredokonfeson, laŭ kiu ne ekzistas postmorta vivo. Tio helpas al mortanto trovi serenecon. Mi diskutis pri tio kun pluraj el miaj ateistaj gekorespondantoj, kiuj konfirmis, ke la kredo pri neekzisto de postmorta vivo alportas al ili trankvilon.

Bedaŭrinde, kredon pri ekzisto aŭ neekzisto de postmorta vivo mi tute ne havas, ĉar nenio estas pruvita. La nura motivo, kial ateistoj firme kredas, ke ne estas postmorta vivo, estas, ke eklezioj instruas la malon. Mi ofte rimarkis ke, se eklezio (ĉefe la katolika) ion senpruve asertas, tuj ateistoj, sen pli da pruvo, kredas sin devigitaj kredi la malon. Eĉ ekzistas malliturgio : la asocio "la liberpenso de Nantes" organizas ĉiujare en la Sankta Vendredo bankedon, kompreneble kun viando.

Se ekzistas nur materio, estas logike pensi, ke post la morto de la korpo restas plu nenio. Sed fine de la 20a jarcento, neniu serioza sciencisto aŭdacus doni definitivan difinon pri la vorto "materio".

Kelkaj psikiatroj, ĉefe usonaj, studas la rakontojn de homoj, kiuj revekiĝis post komato. Ĉar iliaj konkludoj ne kongruas kun ateistaj dogmoj, ili kompreneble "ne estas veraj sciencistoj".

La manko de iu ajn kredo pri postmorta vivo estas eltenebla. Laŭ statistikoj pri la mortaĝo de francinoj, mi ankoraŭ ne atingis la duonon de mia vivo. Do nenio urĝas. Se mi iam timos morti, mi tre verŝajne ne revenos al katolikismo!



Cetere mi notas, ke povas ekzisti religio sen kredo pri postmorta vivo. Tia religio estis judismo dum jarcentoj : la juda parto de la Biblio ne mencias releviĝon. En la tempo de Jesuo, la ideo jam ekzistis, se estis debatata. La praaj kristanoj, per sia aserto, ke Jesuo releviĝis, intervenis en tiam ankoraŭ ne konkludita debato interna de la juda teologio. Nek Moseo (se li ekzistis), nek Davido nek Salomono kredis pri postmorta vivo, nek pri releviĝo.

Kompreneble, kristanoj kredas pri releviĝo. Sed tian kredon mi ne havas. Mi havas ligon kun Dio, kaj laŭ mia koncepto tiu dio estas fonto, el kiu amo radias kaj atingas la mensojn de homoj. Evidentas, ke amo ne estas ĉiopova, eĉ se ĝi estas nedetruebla. Se mia dio ne povas fini la maljustaĵojn sur la tero, kiel ĝi povus certigi feliĉon al mortintoj ? Tial mi ne havas kredon pri morto.

Kara kamarado, mi konscias, ke mia efektiva ekzisto ne kongruas kun sennaciistaj dogmoj pri homoj, kiuj amas siajn naciojn, nek kun ateistaj dogmoj pri dikredantoj. Sed mi povas certigi al vi, ke mi efektive ekzistas. Laŭ statistikoj, mi devus ekzisti dum ankoraŭ pli ol 40 jaroj.


Mi petas do de vi, ne, ke vi rezignu pri via kredo (mi respektas ĉies mitologiojn), se ĝi faciligas vian vivon, kaj eventuale vian morton. Sed mi petas, ke vi bonvolu elteni la fakton, ke mi ekzistas. Pli mi ne petas de vi.

Kun kamarad-decaj salutoj.

La libro de G.R. Ledon "Sennaciece tra nia mondo", kiu tiom inspiris nian amikinon Jakelino, estas disponebla ĉe nia libro-servo (60 FF + afranko). Ĝia disvendado rekte helpas al resanigo de nia kaso. Antaùdankon!

"La nekredemo estas speco de fido almenaŭ tiel respektinda kiel la alia."

Henri ROCHEFORT



*"Pli bone okupi por ripari ol posedi por detrui"*
Jürgen Möller, 1981.
(El serio de 15 poŝtkartoj eldonitaj ĉe Chamissoplatz 6, 1000 Berlin 61)



**Edgard JAMART :**

# Feliĉoj kaj malfeliĉoj de l'kristanismo

(*laŭ* **"Mil jaroj de kristana filozofio"** de *Evaldo PAULI*)
*- fino -*

**11.**

*Dum en la Okcidento la ŝanĝiĝoj estas profundaj, en la orienta Konstantinopolo daŭras la antikva helena kulturo. Tamen kelkaj aspektoj ŝanĝiĝis, ekzemple la rilatoj kun aliaj nacioj efektive ekzistantaj sub nova formo en Okcidento. Ankaŭ ne daŭros la disvolviĝo de la Araboj, kiuj forkonkeros Antiokon kaj Aleksandrion, du el la plej gravaj urboj en la bizantia imperio.*

*En Konstantinopolo kreskas la oficialaj helpoj al la kristana religio. La universitato de tiu nova ĉefurbo estis fondata de imperiestro Teodozio II en 425. La biblioteko en 474 jam enhavas 120 000 volumojn. Aliflanke, tiuj t.n. paganaj lernejoj de Ateno estis fermataj de imperiestro Justiniano en 529. De tiam tiuj atenaj lernejoj suferas la mankon de la antaŭaj lernantoj venintaj el Okcidento. Nun ili suferas ankaŭ la konkurencon de la kristana kaj oficiala universitato de Konstantinopolo. Anstataŭ helpataj ili estis fermataj pro ideologiaj interesoj.*

*La Araboj ankoraŭ ne detruis la bizantian povon en Egiptio kaj Sirio. Sekve, la bizantia kulturo en greka lingvo konsistas ne nur el Grekio, sed ankoraŭ el la tuta Oriento.*

*La orienta kristana filozofio definitive finiĝis en la regionoj reprezentataj de Aleksandrio kaj de Antioko, ĉar ili tiam estis konkeritaj de la Araboj. Pseŭdo Dionizio, Johano Filipono, Johano el Damasko estas la lastaj reprezentantoj de tiu antaŭa signifa kristana regiono. Jesuo jam ne estos amase adorata kiel Dio, sed nur kiel profeto, ĉar tia estas la islama doktrino; laŭ tiu vidpunkto, la islamanoj estos la novaj arianoj.*

*La plej granda erudiciulo de ĉiuj tempoj de Bizantio estis Focio (ĉ. 800-897). La nekapableco de la homoj de Konstantinopolo kaj Romo kaŭzis, ke oni ne profitis sufiĉe bone tiun grandan spiriton, kiun ili prefere kondamnis kiel*

*fieran kaj uzurpeman. Imperiestro Mikaelo III malkonsentis, ke patriarko Ignaco restu episkopo de Konstantinopolo. Oni asertas, ke tiu patriarko atakis la malvirtojn de la imperia kortego kaj ke pro tio la imperiestro eksigis lin de la patriarka sidejo, kun sekva nomigo de Focio. Tiu brila intelektulo estis tuj ordinita de la episkopo de Sirakuzo. Dufoje li okupos la sidejon (858-867, 878-886), sen sukcesi gajni la roman akcepton. La unuan fojon li perdis la sidejon, post kiam estis murdita imperiestro Mikaelo, ĉar la nova jam ne apogis lin. Kiam en 878 mortis la antaŭa patriarko Ignaco, denove Focio iĝis la patriarko de Bizantio. Romo konsentis, nur ĝis surtroniĝis imperiestro Leono VI, kiu refoje ekzilis la patriarkon. Sendube tiuj faktoj rompis definitive la orientan sintenon rilate Romon. La kontraŭa partio atendas nur la oportunan momenton, kiu okazos en 1045, kiam patriarko Mikaelo decidos pri definitiva apartigo. De tiam ekzistas la greka ortodoksa eklezio paralele kun alia grupo nomata romana katolika eklezio.*

## *12.*

*Je la fino de la XI-a kaj dum la XII-a jarcento kreskas la signifo de Okcidenta Eŭropo, kiam la bizantia imperio dronas kaj petas helpon de la krucmilitistoj.*

*Okazas ankaŭ la centraligo de la eklezia povo, t.e. de la papa influo koncerne al la politikaj aferoj kaj la lokaj religiaj iniciatoj de la episkopoj. Oni povas meti kiel ĉefan daton de tiu ŝanĝiĝo la elektadon de papo Gregorio VII en 1073.*

*Komenciĝas la eŭropa imperiismo en Oriento per la krucmilitiroj; tiuj krucmilitistoj luktis ne nur pro religiaj kialoj, kiuj fiaskis, sed ankaŭ por aliaj rezultoj, je kio ili sukcesis.*

*Koncerne la monakojn, ekleziulojn, episkopojn, ili foje venis el la servista nivelo, ĉar tiu religia profesio estis unu el la maloftaj formoj de eliro el la senespera kondiĉo servista. Tamen, la religiaj plej altaj postenoj estis facile kontroleblaj de la nobeloj. Estis ankaŭ episkopoj, kiuj estis feŭdaj senjoroj. Ordinare la episkopoj vestis sin lukse kiel la feŭdaj senjoroj, kaj restis aŭtokrataj same*



*kiel tiuj.*

*La papa povo fariĝis tre rimarkinda dum la dua mezepoka periodo. Jam en la pagana socio la religia kontrolo apartenis al la regnestro; tiu kontrolo apartenas efektive al la politika povo, se oni konceptas ĝin ĝuste. Kiam alvenas Konstanteno, la politika kontrolo fariĝis favore al la kristanoj. La diferenco kun la unua periodo de Mezepoko estas, ke dum tiu unu periodo la ŝtato estas la donanto de la avantaĝo favore al la kristana religio; dum la dua periodo, tiu avantaĝo favore al la kristana religio estas konsiderata sendepende de la ŝtato kaj kiel dia rajto de la Katolika Eklezio, tiel ke la ŝtato devas obei kaj garantii la superregecon de la "vera Eklezio" per premo kontraŭ la "herezuloj" kaj "nefiduloj". Sekve de tio okazis la krucmilitiroj, organiziĝis la inkvizicio en Romo kaj en ĉiuj kristanaj landoj.*

*Kiam monako Hildebrando estis elektita papo en 1073, tuj li agas rigore per la roma Sinodo de 1074 kontraŭ la tiutempe ofta malmoraleco de la ekleziuloj kaj kontraŭ tiuj, kiuj sukcesis ricevi ekleziajn postenojn pere de simonio; en 1075 li deklaris malpermesitaj tiujn, kiuj ricevis siajn postenojn de laikoj.*

*Tiuj nediplomataj agoj de Gregorio VII kontraŭ ĝis tiam ordinaraj procedoj tumultis en la tuta imperio. La germana imperiestro Henriko IV tuj en 1076 deklaris la eksigon de la papo. Tiu siavice ekskomunikas la imperiestron. Laŭ tiutempa interpreto de ekskomuniko (el la eklezio) tio havis kiel konsekvencon ankaŭ la eksigon el la posteno de imperiestro de la Sankta Imperio. La germanaj princoj dum la Dieto de Tribur opiniis, ke Henriko devus esti anstataŭigita, se li ne ricevus absolvon. En januaro de 1077, la imperiestro venas al Italio, kaj en la kastelo de Kanoso li pentofare petis absolvon de Gregorio VII. Sed la imperiestro pentinte pri la pento mem, rekomencis la lukton. Kiam estis elektita alia imperiestro, Rudolfo el Svabo, komenciĝis la civila milito. Henriko, venkinte la truditan imperiestron, venas en Italion kaj surtronigas antipapon. Gregorio VII rifuĝis en la proksima kastelo Sankta Anĝelo (1084), de kie li fuĝis suden al*

*urbo Salerno, sub protekto de la normanda duko Roberto Giskardo; humiligite, li mortis ekster la limoj de la pontifikaj ŝtatoj, en la sekvanta jaro.*

***

*En 1076, la Turkoj okupis Jerusalemon kaj minacis detrui la bizantian imperion. Imperiestro Aleksio Kommenios, fondinto de la nova dinastio en 1081, kiam li jam ne povis rezisti, petegis de papo Urbano II, ke li instigu la okcidentajn princojn helpi lin.*

*Enskribiĝis 600 000 homoj en la unua krucmilito, kiu okazis de 1096 ĝis 1099. Estis konkeritaj Antioko kaj Jerusalemo; per tiu rezulto kreiĝis en Oriento nova kristana regno; ĝi persistos preskaŭ unu jarcenton.*

*La dua krucmilito (1147-1149) celis garantii la rezultojn de la unua; ĝi ne havis grandajn sukcesojn.*

*La tria (1189-1191) devus rekonkeri Jerusalemon, kaptitan en 1187 de Sultano Saladino; ĝi restis sen praktikaj rezultoj.*

*La kvara (1202-1204) konkeris Konstantinopolon de la Grekoj mem. Rezulte, en Konstantinopolo kreiĝis latina imperio, kiu rezistis 57 jarojn, ĝis la Grekoj reprenis sian antaŭan ĉefurbon. Tiu kvara krucmilito demonstris la kreskantan karakterizon de la okcidenteŭropa koloniisma rabado en Oriento. Ekzemple, kvar oraj ĉevaloj, ankoraŭ hodiaŭ ekzistantaj en la fasado de la katedralo de Venecio, estas predo okazinta en 1204, kiam la venecia doĝo Enriko Dandolo konkeris la bizantian ĉefurbon; tie ili devus esti parto de signifa monumento, sed tio ne okazis, ĉar ekde la kvara krucmilito firmiĝis en Oriento la monopolo de la venecia komerca forto.*

*En 1212 okazas, kiel parenteza senracieca fanatikeco la infana krucmilitiro; miloj da kristanaj infanoj el Francio kaj Germanio estis persvaditaj enŝipiĝi en Marsejlo kaj Ĝenovo; kelkaj revenis, multaj restis kaptitaj de la piratoj.*

*La kvina krucmilitiro (1217) kontraŭ Egiptio ne atingis definitivajn rezultojn.*

*La sesa (1227-1229) komandita de la vigla imperiestro Frederiko II, rekonkeris Jerusalemon; tamen post kelka tempo la islamanoj reprenas ĝin.*



*Tute fiaskis la du lastaj krucmilitiroj, komanditaj de sankta Ludoviko, reĝo de Francio : la sepa (1248-1254) kontraŭ Egiptio, kaj la oka (1270), kontraŭ Tunizio. Tiu ĉi lasta revenis post la morto de la reĝo, trafita de pesto.*

*FINO*
*de Feliĉoj kaj Malfeliĉoj de la 1000 unuaj jaroj*
*de l'Kristanismo.*
*La historio daŭris... kaj plu daŭras...*

---

Kompilis **Suzanne** :

## RACIO aŭ MALRACIECO ?

### TUTMONDA KRIZO

Pasis du jarcentoj esperplenaj antaŭ la fino de la dudeka jarcento, kiam la homo alfrontas gravegajn problemojn. Kio okazis ?

La rapida teknika progresado, la komplikeco de la modernaj ekonomioj, la tutmondaj interŝanĝoj kaj ties konsekvencoj sur la malpli gravan nacian projekton, kreis situaciojn, en kiuj la individuoj, la grupoj, la entreprenoj, eĉ la ŝtatoj, serĉas, ofte palpe, sian vojon.

La sendungeco disvastiĝas de lando en landon kaj la uzataj paliativoj kruele trafas la plej malriĉajn. Certe la pacan staton inter la potencaj ŝtatoj ekvilibrigas la teroro, tamen ĉiam estas la milito sur la planedo, ĝi tuŝas nin de malproksime, sed en la areoj kie ĝi daŭras, estas miloj da mortigitoj. La internacia terorismo iom post iom disvastiĝas en la mondo, nova militmaniero aŭ ribelmaniero, kontraŭ kiu la socio sin sentas ne sufiĉe ŝirmata.

Dum regas grava necerteco de la junulara estonteco, samtempe pro la sendungeco kaj pro la konstanta malakordo inter la ŝanĝoj, la kultura evoluado kaj, en Francio, la troa nombro da pedagogiaj provoj, tro akcelataj, la lernejo fariĝis scenejo por bataloj, kiuj fuŝas ĝian mision.

Ĉar la amaskomunikiloj iom post iom starigas sian influon sur la publikon, tial minacas risko de unuformiĝado de la ideoj kaj de socia konformismo.

Maltrankvileco, necerteco fariĝas la loto de niaj landoj tamen privilegiitaj. Aliloke, en la Tria Mondo, akceliĝas la procezo, kiu kondukas la malriĉajn landojn al mizero, foje al malsatego, kaj preparas ribelojn, kies formon neniu povas antaŭvidi, sed jam ofte ili esprimiĝas per religia lingvaĵo.

La fido en ĥimeraj rimedoj oftiĝas, eĉ ĉe kleraj geviroj, kiuj rifuĝas en iluziojn disvastigatajn de propagandistoj pri la neracio, aŭ en la malnovajn aŭ novajn spiritualismojn okcidentajn aŭ orientajn, aŭ ankoraŭ pli grave, en la tokson, kiu fariĝis unu la plagoj de nia civilizo. En aliaj regionoj laŭlitera legado de la "sanktaj" skribaĵoj kondukas la fidelulojn al agoj foje murdaj.

Kiom ne efikaj, kelkfoje kontraŭaj, ŝajnas la solvoj proponataj de ĉiuj flankoj! La ŝtat-asistado, en ĉiu cirkonstanco, kondukas al anonima burokratismo ofte konservativa, kaj la nova liberalismo montras ĉie siajn nocajn rezultojn kaj samtempe sian senenhavan ideologion.

Neeblas malgravigi la profundan krizon, kiu ĵetas ombron sur tiun ĉi jarcentan finon. Ni, racionalistoj, ĝin analizu lucide, sen koncedo, ĉar tiu krizo estas la krizo de la racio. Kaj oni eliĝos el ĝi nur per grandega strebado de la racio.

## KIAL LA RACIONALISMO ?

Racio, racionalismo estas vortoj, kiuj nuntempe suferas malŝaton, verŝajne ĉar oni ne scias kion ili signifas. Sufiĉas iomete pripensi por malaperigi la karikaturojn, kiujn komplezeme faras "pensuloj" kaj amaskomunikiloj.

Estas nenia rilato inter la vera racionalismo kaj iuj ekscesoj ŝuldataj al vera devojiĝo, al senpersonigaj praktikoj, al savaj teknikoj de la socia organizado, same kiel ĝi neniel rilatas kun la seka logiko, kiu fortenus ĉiujn homajn riĉaĵojn, kiujn portas en si mem la individuoj kaj la grupoj. Fine, ĝi tute ne konfuziĝas kun la pasintjarcenta sciencismo, kiu naive opiniis, ke ĉiuj homproblemoj, teoriaj, praktikaj, sociaj, estos solvotaj nur per la scienca progreso.

La vera racionalismo baziĝas sur konstato, kiun la homaro kapablas fari nur de post epoko relative freŝdata. Dum centoj da jarcentoj ĝi vivis en nescio pri sia propra pasinteco, siaj originoj, la kialo de siaj sukcesoj : ĝi atribuis ilin aŭ al la bonvolo de dioj, aŭ al la hazardo, aŭ al la Potenco sanktigita, kaj ĝi senĉese naskis mitojn por klarigi al si mem sian naskiĝon kaj sian destinon. Religiaj mitoj, poste filozofioj anstataŭis ilin kaj foje kombinaĵo de la du. El tiuj mitoj sekvis moraloj kaj politikoj plej ofte rigidaj, kaj kiuj sin pretendis universalaj, tiel favorante samtempe la konservatismon de la sociaj strukturoj kaj la imperiismon de la Potencoj.



Nun la homaro havas pli klaran konscion. Ĝi komprenas, ke ĝi malrapide eliĝis el la animaleco per teknika, scienca, politika kaj kultura klopodo, kiu rivelis mensan kapablon de adaptiĝo, organizado, spertado kaj kritiko, kiun oni nomas la racio. La racio ne konsistas el la tuta homo, sed perfektiginte sian racion, la homo fariĝas homo.

La racionalismo estas unue, ekkoni la fundamentan rolon de la racio en la homaventuro.

*****************************************************************

***Aŭstraliino :***

# KUNIKLOJ...

*Dum preskaŭ du jarcentoj, Aŭstraliaj terkultivistoj kaj brutbredistoj riproĉis la Britojn pro la detruegaj kunikloj, liberigitaj de koloniantoj por ke ili havu ĉasaĵon. La danĝerojn pro enkonduko de fremdaj bestoj kaj plantoj tiutempe oni ne komprenis nek imagis. En Aŭstralio la fekunda kuniklo atingis plagamasojn kaj dezertigis grandajn areojn de antaŭe fekunda agrara tero. Oni eĉ starigis kaj ankoraŭ konservadas milojn da kilometroj da bariloj por malebligi la etendon de la amaso. Finfine, oni infektis la bestojn je miksomatozo, tre kontaĝa virusa malsano, kio kruele kaj rapide preskaŭ neniigis la kuniklojn. Preskaŭ. Ne tute. Povas esti, ke en la estonteco la pesto reokazos.*

*Kial mi rakontas tiele al vi, kiuj estas Franco? Ha! pro tio, ke mi ĵus legis, ke fakte Francoj estas la originaj kulpuloj! Jes! Laŭ arkeologiaj trovaĵoj en (aŭ sub?!) Londono, oni konstatas, ke tra tuta historio, la plejmulto da Londonanoj manĝis kaj manĝas bovviandon. Dum la*

*Roma epoko porkaĵo estis la dua elekto. Je la tempo de konkero de la Angloj fare de la Normandoj en 1066 la dua preferata viando estis ŝafaĵo. Kuniklaj ostoj aperis nur post la jaro 1200. Ĉi tiu eltrovo konfirmas dokumentan indikaĵon, ke la kuniklo estis novalveninto en Anglujo. Tiutempaj bienaj registroj subtenas la hipotezon. La Normandoj enkondukis el Eŭropo la kuniklon kaj estigis kuniklejojn, por ke la bestoj provizu nutraĵon. Ŝajnas, ke post ĉ. 30 jaroj, ne nur la Normandoj sed ankaŭ la indiĝenoj manĝis kuniklaĵon. Ankaŭ Aŭstralianoj iam manĝis tion, sed ne plu. Sufiĉas, ke miksomatozo malpliigis la kuniklojn. Niajn homojn ni eble povos laborigi - iam.*

*Eble vi miros, ke mi sendis al vi ĉi tiun ereton - sed estas malofte, ke oni konstatas interligon inter Aŭstralio kaj Francio, krom, kompreneble, la interligo pro atombomboj provitaj Pacifikoceane kaj uraniovendado de A. al F. Ĉi tiu ero, kiun mi verkis, leginte novaĵeron el mia ĵurnalo, ankaŭ montras katastrofon en Aŭstralio, sed al ĉiaj ruinigaj aferoj terkultivistoj kaj bienuloj de longe alkutimiĝis. Mi prezentas ĉi tion nur kiel eron, kiu eble interesos vin, same kiel min. Saluton!*

*************************************************

**LA BESTO**

Hieraŭ mi vidis beston
en la koto de korto
ĝi serĉis ion por manĝi
inter forĵetitaj nutraĵrestoj

Se ĝi trovis ion
ĝi ne ekzamenis ĝin,
eĉ ne flaris je ĝi.
Ĝi ĉion voris malsate.

La besto ne estis hundo,
ne estis kato,
ne estis rato.

La besto, dio mia,
estis homo.

**Manuel Bandeira**
tradukis H.H.



# KIO ESTAS JOGO ?

Laŭ PIV-difino :
JOGO : Hinda sistemo de filozofia meditado kaj asketismo, destinita efektivigi la unuiĝon de la animo de l'disĉiplo kun la universa spirito: Jogo estas malfacila por la homo sen memregado.
JOGANO : Adepto de tiu doktrino.

Kaj nun ni komencu nian eseon.

JOGO : Unueco, unuiĝo, subjugo (jugo, jungilo); ĝusta agado. SEKVI LA JOGON : Submeti aŭ kontroli pensojn, sentojn, sensacojn, movojn, dezirojn (nome la FUNKCIOJN de la malsamaj centroj: intelekta, emocia, instinkta, motora kaj seksa), kiuj ĝenerale laboras sen iu kontrolo.
JOGANO : Kiu vivas kaj agas laŭ la jogo.

La scienco de joganoj, nome, la metodoj uzataj de l' joganoj por la disvolvo de ties eksterordinaraj povoj kaj fakultoj havas tre antikvan originon. Antaŭ multaj miloj da jaroj la saĝuloj de Hindujo* alvenis al la kono ke la fakultoj de homo en ĉiuj sferoj kaj terenoj de lia aktiveco povas esti eksterordinare disvolvitaj per adekvata trejnado kaj per kutimigo kontroli sian korpon, menson, atenton, volon, emociojn kaj dezirojn.

La jogo estas la ŝlosilo de la tuta antikva scio de Oriento.

La povoj, kiujn donas la jogo, ne limiĝas je la fortikigo de la kompren-kapablo. La jogo kreskigas la kre-kapablon de homo en ĉiuj sferoj kaj planoj de la vivo; ĝi ebligas al li rekte penetri en la misterojn de la naturo; ĝi revelacias al li la sekretojn de la eterneco kaj la enigmojn de la ekzistado.

Samtempe la jogo pliigas la povojn de homo, 1-e por la batalo de l'vivo, nome, kontraŭ la fizikaj kondiĉoj en kiuj naskiĝas la homo, kaj kiuj estas ĉiuj malamikaj; 2-e por la batalo kontraŭ la Naturo, kiu ĉiam klopodas utiligi la homon por siaj propraj celoj; kaj 3-e por la batalo kontraŭ la iluzioj de lia propra konscienco kiu, dependanta

de sia limigita aparato fizika, kreas grandan kvanton da miraĝoj kaj fikcioj.
La jogo helpas la homon batali kontraŭ la falseco de l' vortoj; ĝi montras la vojon por eltrovi la veron kaŝitan en la aĵoj, en la homaj agoj, en la skribaĵoj de la grandaj saĝuloj de ĉiuj tempoj kaj de ĉiuj popoloj.

La jogo dividiĝas en 5 klasojn:

1. Raĝa jogo: Disvolviĝo de la konscienco. Reala Mio (Intelekta kaj emocia centroj)
2. Gnana jogo: (gnosis: kono) Transformiĝo de l'kono. (Intelekta centro)
3. Karma jogo: (Karmo: destino - kaŭzo kaj efiko) Jogo de la ĝustaj agoj per la senidentiĝo.
(Ĉi tiuj 3 jogoj ne postulas forlasi la vivon. La 2 sekvantaj postulas la kompletan forlason de la vivo:)
3. Hata jogo: Regado de l'fizika korpo. (Motora centro)
5. Bakta jogo: Disvolvo de la ĝusta sinteno religia. (Emocia centro)

La jogo instruas al la homo la principojn de la vera ekonomio de fortoj; ĝi instruas al li fari ĉion konscie, **kiam necesas**; ĝi instruas ankaŭ kiom multe li sin trompas pri si mem. Homo konvinkiĝas, ke li estas multe pli malforta kaj sensignifa ol li kredis, kaj samtempe, ke li povas esti pli forta kaj potenca ol la plej forta kaj plej potenca homo, kiun li povas imagi.
Homo devas klopodi harmoniigi en si, atingi la internan unuecon, krei en si permanentan MIOn, protekti sin kontraŭ siaj propraj konfliktoj, animstatoj kaj deziroj, kiuj pelas lin jen en unu direkton, jen en alian.

LA CELO (komuna al la malsamaj jogoj) estas la psika transformiĝo de l'homo kaj la ampleksigo aŭ evoluo de lia konscienco.
La homo, tia kia li naskiĝas kaj vivas, estas nekompleta kaj neperfekta estulo, sed li povas esti transformita kaj kondukita al plena disvolviĝo per adekvataj instruo kaj trejnado. La celo do estas la eltrovo de la supera konscienco. La jogo permesas al la homo atingi la staton de ekstazo (aŭ iluminiĝo), sola stato en kiu la vero povas



esti komprenata!

## LA RAĜA JOGO

Disvolviĝo de la konscienco per transformo de la psiko. La homo kiu studas la raĝan jogon praktike akiras konon pri sia reala MIO. Li samtempe akiras internajn povojn eksterordinarajn, kontrolon pri si mem kaj la kapablon influi aliajn homojn.
La raĝa jogo instruas la memkonon, ĉar la homo tia kia li estas, ne konas sin mem absolute; li havas ideon tute falsan kaj neperfektan pri si mem.
La studo pri la propra vivo psika revelacias al la homo kvar eblajn statojn de konscio. Ili nomiĝas :

| EN LA HINDA PSIKOLOGIO | EN LA TRANSFORMISTA PSIKOLOGIO** |
|---|---|
| - Profunda dormado. | -- -- |
| - Dormado kun sonĝoj. | - Sonĝado. |
| - Stato de revado. | - Revado (Relativa konscio). |
| -- -- | - Memkonscio (Konscio pri si). |
| - Stato de iluminiĝo. | - Kosmokonscio (Objektiva Konscio) |

1-e: NE PENSI

Unu el la taskoj: Laŭvole haltigi la pensojn (ne pensi) STOP! Por ripozigi la psikan aparaton kaj ŝpari psikan energion, kiu konsumiĝas en nenecesaj pensoj. Kiam oni lernis NE PENSI, tiam oni devas lerni pensi.

2-e: PENSI

Pensi pri tio kion oni volas pensi, kaj ne pri kiu ajn aĵo, kiu venas en la kapon. Temas pri metodo koncentriĝi rilate unu aferon, sen esti devojigita de akcidentaj asociiĝoj.

3-e: MEDITI

Mediti estas profunde ekzameni la malsamajn aspektojn de donita afero; eltrovi ĝiajn korelativecojn kaj analogiojn. Ĉi tio proksimigas la disĉiplon al la "nova konscio" (la konscio pri si), kiu ekrevelacias al li, dummomente, senfine forajn horizontojn.

4-e: KONTEMPLI

Kontempli estas eniri profunde

en ideon, en mensan panoramon, ekzemple, en fenomenon de la naturo. (Ĉi tio permesas al li kontakti la plej profundajn misterojn de l'universo).

****

RESUME : La transformo de la konscienco permesas al la homo fakte senti kaj esti konscia pri siaj altecoj kaj siaj nealtecoj (nivelo de esto) interne de si mem, kaj ekesti en kontakto kun la eterneco kaj la infinito, nome, senti ke li ne estas mortemulo, portempa kaj finita polvero en la senlima universo, sed senmorta ento, eterna kaj senfina same kiel la tuta universo, guto en la oceano de la spirito, sed guto kiu povas enhavi la oceanon!

Kiel rezulto la homo atingas staton de eksterordinaraj libero kaj povo. Li ne nur kontrolas sin mem, sed ankaŭ kapablas kontroli la ceterajn. Li povas legi la pensojn de aliaj homoj ĉu ili estas proksime aŭ fore de li; li kapablas transsendi al ili siajn proprajn pensojn kaj dezirojn kaj subordigi ilin al sia volo. Li povas akiri klarvidadon, vidi la pasintecon kaj la venontecon.

ALIAJ IDEOJ DE LA RAĜA JOGO

1. Apartiĝo aŭ disiĝo. (Ne emi al la aĵoj de la vivo, ne identiĝi al ili).
2. La homo ne estas unuo, li ne havas permanentan MIOn.
3. La homo ne ekzistas izolite de la homaro kaj de la Naturo. (Li estas parto de la tuto.)

**LA GNANA JOGO**

La gnana jogo kondukas la homojn al la perfekteco, transformante ilian konon rilate ilin mem kaj rilate la mondon. (Psikologia kaj kosmologia konoj).

Ĉi tiu ampleksigo de la ideoj kaj konceptaĵoj kondukas al la ampleksigo de la perceptado, kaj ĉi tiu ampleksigo de la perceptado fine kondukas al ŝanĝo en la sensacoj per elimino de falsaj kaj iluziigaj sensacoj.

La gnana jogo instruas ke la vero estas tia nur por la homo kiu sentis ĝin kiel veron.

**LA KARMA JOGO** (Ĝuste agi, ne identiĝante)

La sama ago povas realiĝi laŭ malsamaj manieroj; la



sama okazaĵo povas esti travivata laŭ malsamaj manieroj, kaj se la homo ŝanĝas sian sintenon al tio kio okazas al li, ĉi tio neeviteble ŝanĝos post tempopaso la karakteron de la faktoj kiuj troviĝas sur lia vojo.

En vivo regata de la principoj de l'karma jogo, la homo ne klopodas eviti tion malagrablan aŭ tion malkomfortan. Kontraŭe, li volonte akceptas tion, ĉar ĝi prezentas al li la okazon venki ĝin. El ĉi tiu vidpunkto, se la vivo ne prezentus malfacilaĵojn, estus necese krei ilin artefarite. (Kvankam foje preferindas eviti la premajn situaciojn, iujn ekstremajn kazojn, nome, malkonekti sin de la premaj situacioj!)

Ĉefa principo: la disiĝo, nome, la izoliĝo aŭ apartiĝo de tio okazanta ĉirkaŭe, aŭ de tio kion oni faras.

La karma jogo instruas, ke la homo povas ŝanĝi la homojn kaj la faktojn okazantajn ĉirkaŭ li, ŝanĝante sian sintenon antaŭ ili.

Ĉi tiu ideo estas tre klara; ĉiuj homoj ekde sia naskiĝo troviĝas ĉirkaŭitaj de iu karmo (destino), de iuj homoj kaj iuj ĉirkonstancoj. Kaj laŭ sia naturo, eduko, gustoj kaj kutimoj, la homo adoptas sintenon al la aĵoj, la homoj kaj la cirkonstancoj.

Dum tiu sinteno restas nevariigebla, la homoj, la aĵoj kaj la cirkonstancoj restas nevariigeblaj, nome, en akordo kun lia karmo (destino).

Se la homo ne estas kontenta pri sia destino, se li volas ion novan kaj nekonatan, li devas ŝanĝi sian sintenon.

**ERGOTO DE BONAERO**

* Hindujo : Antikva lando hinda, en kontrasto kun la nuntempa Hindio.
** (Gurdiefo-Uspensko-Nikolo)

Detaloj pri ĉi tiu sistemo troviĝas en la verko : FRAGMENTOJ DE NEKONATA INSTRUO, de P.D. USPENSKO)

Ankaŭ oportuna enkonduko haveblas en: PSIKOTRANSFORMISMO - por nova maniero de pensado - (la 4a vojo aŭ vojo de l'sagaca homo), eldonita de SAT-broŝurservo.

**************************************************************

## AMARECO

**M**i ĉiam ĝojis pro la ĝojo de aliuloj, eĉ se tio ne donas avantaĝojn al mi. Alies ĝojo estas la mia, sen iu ajn intereso. Sed nun via ĝojo suferigas, plorigas min! Ĉar mi volas ke vi ankoraŭ, almenaŭ por unu fojo, ridu kun mi kaj mi kun vi.

Ke vi nun, male, sentas vin plene feliĉa kun alia knabino, tio estas doloro por mi, doloro kun nostalgio kaj sopiro, ne kun malboneco kaj ĵaluzo.

Vi certe estus amanta min, je aliaj cirkonstancoj; ĉar via animo ektuŝis la mian, ankaŭ via korpo. Eble ankaŭ vi flaris en mi inan ĉarmon, ian nostalgion, eble vin tuŝis la bedaŭro ke inter ni nenio estas realigebla.

Ĉu vi povas forgesi niajn promenadojn en la kongresa urbo, laŭlonge de la rivero, kun mano en mano? Ĉu vi povas forgesi nian sidadon sur la benko fronte al la rivero, kiam vi aŭskultis ĉarmigita miajn rakontojn? Mi sciis bele paroli, nur ĉar vi atente aŭskultis min. Vi preskaŭ dronis en la atmosfero de miajn rakontoj.

Sciu, ke antaŭ mia foriro de hejmo por atingi la kongreson, mi planis viziti ortopedian kuraciston. Miaj kruroj, miaj brakoj en la lito pene moviĝis... Poste, kiam mi renkontis vin, mi ne plu bezonis ortopediston. Ekkreskis flugiloj. Mi tiam komprenis ke la tristeco, la doloro, la soleco paralizis min... Tro malmulte da oksigeno vivigis min. Vi estis la oksigeno, kiu transformis min.

Kun vi mi kuris. Ĉu vi memoras, ke post la fino de la ekskursoj kun la aliaj, mi malsupreniris la aŭtobuson kaj piediris ĝis nia loĝejo? Tri, kvar kilometrojn kaj tio ne lacigis min. Mi bedaŭris nur, ke de tempo al tempo vi haltis por diri al mi, ke vi ne povas geedziĝi kun mi.

Ĉu vi povas supozi, ke mi havis tian iluzion? Niaj cirkonstancoj ne permesis geedziĝon. Eble vi pensis ke estus bele se tio povintus.

Mi, miaflanke, havis emon por vi, kaj se vi edziĝus kun mi, mi lasus al vi la tutan liberecon por rekompenci vin. Mi tolerus ankaŭ jarojn de via malesto por kelkaj momentoj de feliĉo; kaj je via reveno, mi lumigus la tutan hejmon, la tutan ĝardenon kun koloraj globetoj por festi vin.

Jes, estis ĉarmo inter ni, ne ripetenda!

Ĉu vi memoras kiam vi aĉetis glaciaĵon je napola bankvendejo? La glaciaĵo estis treega kaj gutis. Mi, kiu havis belan veston, timis makuli ĝin. Pro tio mi kurbiĝis kaj la gutoj falis teren. Tiam la glaciaĵvendisto laŭte ridegis. Vi apenaŭ ridetis. Ankaŭ mi laŭte ridegis por kaŝi la embarason kaj por ne doni ŝnuron al la mokaĵo.

Ĉu estas en via rememoro la lasta paĝo de nia kunesto? Ni ekskursis iom trajne, iom skitelfere, iom ŝipe... Via brako ĉirkaŭis mian talion, kaj al mi tio ŝajnis la eterneco. Mi ne konsciis pri nia baldaŭa disiĝo.

*

Poste la malproksimeco sen promesoj. Estis demandsigno nia revidiĝo. Tamen mi dediĉis al vi miajn pensojn. La necerteco, kiu cetere estis espero revidi vin, helpis al mi vivi sen vi.

Ho, kiom mi volus kvietigi mian sopiron esti kun vi ankoraŭ kelkajn momentojn! Nova kongreso alproksimiĝas... Kial ne?

Sed... Nun esperoj ne plu ekzistas. Mi eĉ ne plu deziras revidi vin. Vi definitive ligiĝis al la alia knabino pri kiu vi ofte parolis al mi. Ne plu allogo pri neeblaĵoj, pri miraklaj renkontiĝoj, ne plu nostalgio pri pasintaj feliĉoj, kiuj ne plu ripetiĝos. Vi definitive ligiĝis al alia knabino por geedziĝo.

Antaŭ via ligiĝo, mi ploris. La antaŭan vesperon, mi atendis tramon en strato Labikana en Roma. Aŭtomobilo haltis antaŭ mi. Sinjoro kaj sinjorino demandis min: "Ĉu vi fartas malbone? Ĉu ni povas helpi al vi?". Poste paro de afrikanoj, kiuj atendis kiel mi la tramon, faris la samajn demandojn. Mi sekigis miajn okulojn, mirigita ke en mondo de indiferenteco kaj de fruiĝo, iuj estis rimarkintaj mian doloron. Kaj dume mi ripetadis mallaŭte: "Kial vi faras tion, mia kara, ĝuste nun, kiam estas okazo por revidi nin?"

Tamen al vi, kiu sciigis min pri la okazintaĵo, mi skribis:

"Via anonco ne mirigas min. Ke vi volas geedziĝi, tio estas normala afero. Pli-malpli frue tio devus okazi. Kaj vi partoprenigis min pri via feliĉo!"

**Lina Gabrielli**

*************************************************************

**Kio estas la vivo?**

La vivo
tio estas la varmo
de la akvo en mia banĉambro

La vivo
tio estas mia buŝo
sur via malferma sino

La vivo
tio estas la kolero
kontraŭ la maljusteco en niaj landoj

La varmo de la akvo
ne sufiĉas
Mi devas aldone plaŭdi en ĝi

Mia buŝo sur via sino
ne sufiĉas
mi devas aldone kisi ĝin

La kolero kontraŭ la maljusteco
ne sufiĉas
Ni devas aldone esplori ĝin

kaj fari ion
kontraŭ ĝi
Jen la vivo.

**Erich Fried**
trad. Hagen Hirte

***************************

**Mazdaĵetoj**

Revo

Tutviva amo?
Jes, sed kun
malsamaj damoj!

Konvena paro

Ŝi jam preskaŭ
adoleska,
kaj la viro
tutplenkreska.
(Ĉar inverse:
ge - groteska!)

Vera aserto

Ŝi pravas,
ke ŝatas
oferti:
"Mi havas
nenion
por perdi!"





# VORTOJ DE MALJUNULO

----
valo
----

## Ĉu malesperi ?

*En la 11a jarcento (de la kristana erao) Irano estis lando de alta kulturnivelo, kun belega poezio, rafinitaj artoj, klerega scienco kaj libera penso, brile reprezentataj de la granda Omar Ĥajam. Jarmilon poste tie regas obskurantismo sub la sanga diktaturo de imano Ĥomejni. Ĉu do tiu granda popolo tiel degeneris ?*

*Ni scias ja, ke la freneza blankbarbulo fanatikigis milionopajn homamasojn, kaj pretigis ilin al murdo pro religia kredo. Sed ni memoru : ni same vidis grandegajn homamasojn elektrizitaj per la blekadoj de Hitler, aliajn proklami, ke "Stalin estas ĉiam prava". Tamen la brita, germana kaj rusa kulturoj ne mortis. En Germanio, en Sovetio, en Hispanio, en Italio, en Portugalio ktp., la fajro daŭre brulis kove sub la cindro. Iam ĝi reviviĝas, reekflamas, kaj el tenebroj rebrilas lumo. Same ni scias, ke en Irano restas artistoj kaj poetoj, inteligentaj kaj kleraj homoj, liberpensuloj - kaj esperantistoj. Nun parte subpremataj kaj mutigitaj, iam ili relevos la kapon, kaj iros renkonte al la suno, gvidante liberigitan popolon.*

*En la pligranda parto de la mondo regas mizero kaj malsato, kiu amase mortigas homojn. Sur la tuta planedo nia teknika civilizacio, mise kondukata, ĉiutage neniigas bestajn kaj vegetaĵajn speciojn, venenas la teron, la akvon kaj la atmosferon. Tamen jam kelkaj klarvidaj homoj ekkonsciis pri la danĝeroj, kaj alarmas la publikan opinion kaj la registaron. Ĉiam kelkaj izolitaj voĉoj, predikantaj en dezerto, anoncas venontajn progresojn.*

*Neniam ni malesperu pri la homaro.*

## Kamaradoj

*Mi relegis (kiomafoje?) la tekstojn de la paroladoj de Zamenhof en la unuaj universalaj kongresoj, de Bulonjo 1905 ĝis Krakovo 1912. Kia sukoriĉa, fortikiga legado! Kia neelĉerpebla fonto! Ĉu ĝi ne devus esti uzata kiel legolibro en ĉiuj kursoj pri esperanto ?*

*Mi rimarkis, ke parolante pri esperantistoj, Zamenhof plurfoje uzis la vorton "kamarado" konkurence kun "samideano". Ĝi do ne estas invento de laboristaj esperantistoj, de SAT-anoj, ĝi estas ja iniciatita de la Iniciatoro mem. Ni ĉiuj rajtas rigardi nin kiel kamaradojn de la "majstro", ĉar por li ĉiu esperantisto estis kamarado.*

*En iuj landoj, ĉar por la registoj ĝi kunportas danĝeran politikan sencon, ni pro necesa singardemo devas eviti ĝian uzadon. Sed ĉie, kie la homaj rajtoj estas (pli-malpli) respektataj, ni ne havas motivon por kaŝi la kamaradecan senton, kiu kunligas nin. La ekzemplon donis al ni la granda pioniro, la unua esperantisto, unua en ĉiuj sencoj de la vorto.*

*Helpu al ni, kamarado Zamenhof, kaj montru al ni la vojon!*

*Kaj ni, kamaradoj en la tuta mondo, ni ĉiam tenadu sur niaj bretoj la libron de Paroladoj kaj Poemoj, kaj ofte ĝin relegu.*

**Paroladoj kaj Poemoj.** eld. Kultura Kooperativo de Esperantistoj.
Av. Treze de Maio. Sobreloja 208. Rio de Janeiro. GB. Brazilo.
(senpaga reklamo)

## Tempoj

*Oni ne facile prezentas al si longajn tempodaŭrojn. La amfiteatro de mia urbo (la "Arenoj") estis konstruita de Romianoj antaŭ du jarmiloj, 80 generacioj. Se po unu reprezentanto de ĉiu generacio starus flanko ĉe flanko, la tuta vico estus entenata en unu akso de la interna elipso de la amfiteatro. Se po dek homoj naskitaj en ĉiu jaro kune sidus sur la ĉirkaŭa ŝtuparo, la tuta amaso apenaŭ plenigus ĝin.*



*Eĉ pri malpli longaj periodoj ni havas malprecizajn nociojn. Mi facile imagas, ke antaŭ cent jaroj, kiam mortis Viktoro Hugo, miaj avoj estis respektive 55- kaj 35-jaraj, ke mia patro estis jam 15-jara kaj mia patrino 11-jara. Miaj genepoj scias, ke mi vivis dum la unua mondmilito, kaj ke ilia alia avo, iom pli aĝa, partoprenis en ĝi, sed tiu Granda Milito aspektas al ili kiel nebula legendo el fora praepoko. Eĉ pri la dua, kiun travivis iliaj gepatroj, ili havas nur malprecizan bildon.*

*Same, mi scias, ke mia pliaĝa avo, kiun mi konis, estis 40-jara, kiam okazis la milito de 1870 kaj la Komuno. Ke li 18-jara partoprenis en la revolucio de 1848. Ke li naskiĝis dum la revolucio de 1830. Ĉion ĉi mi scias, sed tiuj aferoj ŝajnas al mi okazintaj en fabelaj tempoj kaj lokoj.*

*Eĉ eventoj, kiujn mi precize memoras, ĉar ili okazis en mia propra vivotempo, ŝajnas al mi foraj : 1914-18, 1936, 1968...*

*Pli ol aliaj, maljunuloj konscias, ke la nocio pri la tempo estas relativa kaj subjektiva. Sed kio ne estas relativa kaj subjektiva ?*

*Nu, halt'! ĉar mi ekvagis sur la tereno de filozofio, pri kio mi ne estas kompetenta.*

## Tragika travivado

***1928.** Niaj gefiloj estis malgrandaj : Franko 4-jara, Monika 2 ½ jara. Ni banis ilin kune en la bankuvo. Post bano mia edzino komencis revesti Frankon en la kuirejo, kaj Monika restis en la banĉambro.*

*Mi tien iris, kaj trovis ŝin dronanta en la ankoraŭ ne malplenigita kuvo. Ekvolinte lavi siajn tukojn en la restanta akvo, ŝi klinis sin sur la bordo, perdis la ekvilibron, kaj falis kapantaŭen en la akvon.*

*Mi tuj elprenis ŝin : eta korpeto, mola, inerta, malvarma, blanka, kun fermitaj okuloj kaj streĉe kunpremitaj dentoj. Mi fulme venis en la kuirejon kun raŭka krio,*

kvazaŭ blekego de vundita besto : Ho! Ivona! Mi senforte falis sur seĝon, sed tuj : "Donu al mi tranĉilon por malstreĉi la dentojn, kaj metu sur ĝin lanan kovrilon." Ŝi aŭtomate obeis, kaj tuj poste sage flugis al amikoj loĝantaj je distanco de 150 metroj. Ŝi trakuris ĝardenojn, transsaltis heĝojn kaj muretojn, alvenis al la amika domo - kaj tuj retroiris rapidege, dum la amikino diligentis voki kuraciston.

Dume mi estis penege sukcesinta disigi la kunpremitajn dentojn, kaj, tenante la etulinon je la piedoj, kun la kapo malsupre, mi igis ŝin vomi la glutitan malpuran akvon.

Kiam Ivona anhelante atingis nian pordon, ŝi aŭdis Monika plori.
SAVITA !

Ŝi preskaŭ svene falis, sed tuj grimpis la ŝtupojn po kvar, sin lasis fali sur seĝon, singultante, ploregante, ridegante, premis la filineton sur sia brusto, kovris ŝin per kisoj, kisis min, kisis Frankon, kiu nenion komprenis.

Tre baldaŭ venis la amikino kun la doktoro. Tiu ĉi sobre diris : "Nu! bone. Donu al la knabineto por trinki varman fortan kafon kun sukero, kaj daŭrigu teni ŝin varme. Mi revenos posttagmeze, sed trankviliĝu : estos nenia sekvo. Vi faris la neceson, ĉio iros glate." Kaj li eliris.

Nova interkisado en ĝoja etoso. La amikino prenis Monikan ĉiam envolvitan en la lankovrilo, kaj milde lulis ŝin sur siaj genuoj, dum Ivona preparis la kafon por ŝi kaj por ni ĉiuj. Franko kaj mi, de tiam neutila, stulte gapis.

Nun Monika, 63-jara, kun ama sindono helpas kaj flegas sian maljunan vunditan patron.

Ŝi neniam timis naĝi en maro aŭ en rivero, sed ŝi konservis instinktan repuŝon kontraŭ bankuvoj, kaj preferas duŝon.

Dum multaj jaroj Ivona kaj mi tute ne povis paroli eĉ unu vorton pri tiu terura rememoro. Kaj ankoraŭ nun,



60 jarojn poste, se iafoje ni ĝin elvokas, ni ne povas nin deteni de nevola tremo pro retroa timego.

## Lingvoj

Mia patrina lingvo estas la franca. En mia infaneco mi aŭdis ankaŭ ĉiutage la okcitanan en ĝiaj langvedoka kaj provenca dialektoj. Mi ĝin bone komprenas, kaj parolas flue, sed ne tre pure nek tre lerte.

Adoleskante mi iom lernis aŭtodidakte la italan. Mi legis en la originala teksto facilan libron de Edmondo de Amicis kaj la mondfaman Pinokjo'n.

En lernejo mi lernis kvin jarojn la anglan, sen granda profito.

Dum mia militservo kun tunizianoj mi komencis lerni parole kaj skribe la araban. Dum tridekmonata restado en Rejnlando mi lernis kaj praktikis la germanan, kaj ankoraŭ nun mi korespondas en tiu lingvo kun rejnlandaj geamikoj.

Ĉu do mi diru min poligloto ? Certe ne. Ĉar en tiuj fremdaj lingvoj mi ne atingis altan nivelon. Por bone povoscii lingvon, necesas dediĉi al ĝi longan tempon kaj paciencan strebadon. Pri neniu el tiuj lingvoj mi devigis min al tiel diligenta penado. Kial ?

Mia respondo estos klara. Mi trovas plej utile kaj plej urĝe pliprofundigi mian intimecon kun la lingvo internacia. Nu, por pliperfektiĝi en iu lingvo, eĉ tiel "facila" kiel Esperanto, ne tro longa estas tuta vivdaŭro. Mi estis eklernanto en mia 13-a jaro, kaj en la 89a mi restas ankoraŭ plulernanto.

Mi kredas, ke al homoj de humanista kulturo, kiuj lernis kiel studentoj la latinan kaj la grekan, kaj kerne posedas sian nacian idiomon, plus eble almenaŭ unu alian, estas pli facile kaj rapide familiariĝi kun Esperanto. Ĉi tie mi parolas pri homoj kun unuagrada instruiteco kiel mi, kiel la plimultaj el la laboristoj. Precipe al tiuj Zamenhof destinis sian genian elpensaĵon.

## 12an de februaro - Denove pri mia farto

*Komence, geamikoj, la procezo al resaniĝo estis rimarkinde rapida. Sed kvin monatojn post la akcidento, la progreso subite haltis. La kaŭzon evidentigis radiofoto : la frakturita osto estis firme lutiĝinta - kaj misformita. La koksartiko ne povas kaj ne povos glate ludi. Mi daŭre lamos, pene kaj dolore. Krom se...*

*Restis unu ebla rimedo, kirurgia : enplanto de plasta protezo inter la konkavo de la pelvo kaj la globa femurkapo. Operacio banala ĉe maljunuloj, kaj ĝenerale bone tolerata. Mi do decidis provi ĝin, la 6an de februaro.*

*La morgaŭon mi komencis iom leviĝi kaj marŝi kelkajn paŝojn. La duan tagon, duoble pli longe. La trian, trioble. Poste paŭzo : movoj pli malfacilaj, vertiĝoj en la stara pozicio. Kaŭzo : anemio konsekvenca de la operacio. Oni faris al mi sango-transfluon kaj hodiaŭ la reedukaj movoj estis iom pli facilaj. Mi atendas la sekvon. Ĉu stagnado? Ĉu regreso? Ĉu starto al nova pliboniĝado? Mi vetas kompreneble, pri la tria. Ni vidos. Almenaŭ ĉio ebla estos provita. Kio ajn rezultos, mi ne bedaŭros mian decidon.*
*Ĝis nova informo, espereble baldaŭa.*

## 19an de februaro

***90**-a datreveno de mia naskotago. Mi retroviĝas hejme.*
*Post dufoja riparo mia koksartiko funkcias pli kaj pli bone kaj malpli dolore.*
*Dume mia vidkapablo, mirinde plibonigita en aprilo 1988 per katarakta operacio, denove difektiĝas. Ĉi-foje pro retina malsano, kontraŭ kiun ne ekzistas kuracrimedo en la nuna stato de la oftalmologio. Kaj mia aŭdkapablo estas neperfekte korektata per orelprotezo. Ankaŭ mia edzino suferas san-kriplaĵojn, kiuj estas ordinaraj akompanantoj de nia komuna nekuracebla malsano, nome la maljuneco.*

*Kion fari? Nur rezignacie atendi la baldaŭan finon. Kun la espero konservi, se ne menson sanan en korpo sana, almenaŭ menson ne tro kadukan en korpo ne tro kripla. Kun la memoro pri belaj tagoj kaj momentoj en longa vivo. Kaj precipe kun la ĝojo vidi ĉirkaŭ mi viglajn junajn mensojn en junaj viglaj korpoj. Tio estu mia konsolo.*



*******************************************************************

Omaĝe al nia amiko Valo, jen du poemoj de Ergoto de Bonaero :

**REJMONDO LAVALO** (= VALO) - pantuneto -

MIGRANTE TRA METIOJ, KONTRAŬFLUE,
Rejmond' LAVALO agas laŭ la celo,
jam EL LA KARA INFANECO, brue!,
dum SEPDEK JAROJ SUB LA VERDA STELO!

Rejmond' LAVALO agas laŭ la celo
en ESPERANTO KAJ LITERATURO
dum SEPDEK JAROJ SUB LA VERDA STELO,
for de l' fikcioj de l' ebura turo!

En ESPERANTO KAJ LITERATURO
VORTOJ DE MALJUNULO laŭtas plue,
for de l' fikcioj de l'ebura turo,
MIGRANTE TRA METIOJ, KONTRAŬFLUE!

- soneto -

Rejmond' LAVALO agas laŭ la celo,
jam EL LA KARA INFANECO, brue,
MIGRANTE TRA METIOJ, KONTRAŬFLUE,
dum SEPDEK JAROJ SUB LA VERDA STELO!

Strebante al la bono kaj la belo,
eklernis Esperanton li tre frue;
daŭrige li laboras plu-konstrue
kun samaj fido, volo kaj fidelo.

En ESPERANTO KAJ LITERATURO
VORTOJ DE MALJUNULO ĉiam laŭtas
for de l' fikcioj de l'ebura turo,

kaj certe eĉ se li ne kosmonaŭtas,
la vortoj vin flugigos kontraŭvole,
la pensoj vin pensigos nefrivole!

## Patrolanda tero

Povra estas lando de estonoj,
ne troviĝas tie oro kaj arĝento,
buntas kampoj pro sennombraj ŝtonoj,
tamen laborvola estas nia gento.

Foje ial min favoris sorto:
mi manplenon de la grundo prenis
el mallibereja griza korto
kaj ĝin kaŝe sub la vestoj tenis,
kiam ĝin en Siberion kune portis -
tiun etan eron de patruja tero,
eble dank'al ĝi dum jaroj mi ne mortis,
helpis ĝi atendi, ke revenos vero.

Frosto kaj malsato murdis sen mezuro
en la regiono norda vasta,
malaperis en neĝŝtormo pada spuro,
malaperis mia forto lasta.


Ĉu kolekti eblas la suferon
kaj kalkuli punon superigan?
Kondamnitoj perdis la esperon,
kredon je normala viv' instigan.

Tamen ne mortigis ili korpon nian
kaj forskuis kalumnion forta volo,
en mizero ni apogis unu la alian,
nin apogis la spirito de popolo.

Nia lando estis longe sklavigita,
fine nun ni pli libere spiras.
Laŭ patruja tero sanktigita
kune ni denove rekte iras.

20. febr. 1989 **A. Apollo**





***J. DEKO** (inĝ.A&M) :*

## NEROMPITA ĈENO

*Dankon al Valo, kiu rememorigis la, por ni, ŝlosilajn aĝojn de la Majstro : 28a, 46a, 58a. Tion ni legis en L! de nov.dec.1989, n°85 paĝo 24, alude al la monumento dediĉita en urbo Pau, al la juna doktoro L.L.Zamenhof.*

*Per tiu trituna, granita monumento apud la Universitatkvartalo, ni deziris montri al la nuntempa junularo ke, iam, junulo donis al la ĉiamaj gejunuloj ilon por komuniki sian penson, por reciproke mondskale disvastigi pensojn, informadojn, sciojn, trans lingvaj bariloj, sen perfida tradukado, ilon por savi pacon kaj liberecon. La bronza medalego, kies pezo estas dudek kvin kilogramoj kaj diametro kvarcent centimetroj, montras obstineman vizaĝon, modelo de nelacigebla obstineco.*

*Kiam mi mem estis juna studento en porinĝeniera lernejo, mi ege deziris renkonti esperantistajn inĝenierojn, eble por firmigi mian penson pri esperanto, ĉar malhelpis min la opinio de miaj samlernejanoj. Du adresojn mi trovis en jarlibro de UEA (aŭ de IEL) aĉetita ĉe unu el la multnombraj librobrokantistoj, kies kestoj laŭlongas la kajojn de rivero Seine, en la centro de Parizo. Kiu akceptis min tiun vesperon de julio 1945, ĉe si, en strato Dode-de-la-Brunerie, Favrel aŭ Naoumof ? La aĝo de tiu E.C.P.inĝeniero certe estis la duoblo de la mia, kaj de tiu "maljunulo" mi respekteme aŭskultis la parolojn. Nun, estante vera maljunulo, mi povas diri, ke li donis al mi unu el la plej gravaj konsiloj, kiuj, kiam plenumataj, taŭge gvidis mian vivmanieron: "Daŭrigu lerni kaj uzi esperanton. Ĝi helpos vin resti juna, almenaŭ per tio, kiam pliaĝiĝinta, vi restos ankoraŭ en junulara etoso."*

*La "maljunulo" pravis. Malgraŭ malhelaj kontraŭdiroj de miaj diversaj ĉirkaŭantoj mi persistis, foje erarante, alifoje sukcesante, neniam malkuraĝiĝante. Tamen mi devas konfesi ĉefan eraron de miaj klopodoj : kvankam nia klubo ŝuldas al ĝi tri lertajn, agrablajn, agemajn membrinojn, mi dediĉis tro da tempo al varbado ĉe triaĝula medio anstataŭ informi kaj instrui junulojn. Tiuj ĉi lastaj estas la futuro. Iliaj konoj utilos dum multjara vivespero. Ili lernas dekoble pli facile. Kiel plezurdone estas konstati tion en klasĉambroj, kiam leviĝas arbaro da brakoj postulantaj respondi demandon, paroli aŭ kanti. Kia plezuro estas legi admirantajn mirojn sur la vizaĝoj de la geinstruistoj, kiam, ekzemple, ili konstatas kiel facile iliaj gelernantoj finfine ekscias la diferencon inter subjekto kaj rekta komplemento. Same estas kiam la infanoj malkovras facilajn, kvankam neevidentajn, rilatojn inter la franclingvaj vortoj : "Ils, leur, me, te, mon, se...". Vere, evidentas al mi, ke mi prisemas bonan grundon, por postmultjaraj rikoltoj.*

---

VALO :

## MI PERSISTAS KAJ SUBSKRIBAS

Kelkaj amikoj legantoj estis ŝokitaj pro miaj kredkonfesoj ateista kaj sennaciista. Tia mi estis en 1914, tia mi restas en 1990. Oni diras : nur stultuloj ne aliiĝas. Do mi estas stulta, mi konsentas. Mi estas maljuna ripetaĉulo. Mi do ripetaĉas :

- Mi estas ateisto, ĉar ne ekzistas Dio nek dioj.
- Mi estas kontraŭreligia, ĉar la religioj naskas fanatikon, kiu estas fonto de krimoj. Inkluzive naciismon, etnismon, patriotismon, marksismon-leninismon*, kiuj estas ja religioj.
- Mi estas sennaciisto, kaj aspiras al sennacieca kulturo, kiu, esprimate per la lingvo internacia, sin nutros el la naciaj kulturoj, kiel, ekzemple, la franca kulturo estas nutrita el la grek-latina, la judkristana kaj kelkaj aliaj. Tiel ĝi ne estos sensuka nek senkolora, sed male, bunta kaj riĉa.

Finfine, mi estas maljuna ateisto kaj sennaciisto, tro maljuna por nun evolui. Krom ĉiam ebla freneziĝo aŭ menskadukiĝo, mi restos tia ĝis mia morto.



* En 1917-18, post Zimmerwald kaj Kienthal, post la soveta revolucio, mi estis preskaŭ leninisto. Sed baldaŭ la sinteno de Lenin kontraŭ la anarkistoj, kaj lia libro "La infaneca malsano de komunismo : la maldekstra komunismo", legita en 1920, seniluziigis min.
(Do almenaŭ tiurilate, mi ŝanĝiĝis).

---

JAKELINO (al Valo) :

## MIA POSTHIROŜIMA RELIGIO

Se islamano dirus al ateisto : "Finfine vi ja kredas, ke ne ekzistas dio krom Alaho", certe la ateisto respondus : "Sed ankaŭ Alaho ne ekzistas!"

Same, al sciencadoranto, kiu diras : "Ne estas konebla vero krom per scienco" mi respondas : "Sed ankaŭ per scienco neniu vero estas konebla!".

"Scienco observas, esploras, pesas. Ĝi forĵetas eluzitan hipotezon por pristudi novan." Prave : la hieraŭa hipotezo jam estas forĵetita, kaj la hodiaŭa vero morgaŭ estos kaduka. Iam la science pruvita vero estis, ke atomo ne estas disigebla. Nun atomon oni disigas. Eble tio estas progreso de la scienco. Sed ĉu tio alportas bonon al la homaro ?

Kiu kredas, ke la scienco alportas definitivan veron, kaj ke la scienca progreso certigas la feliĉon de la homaro, tiu estas kredanto, same absurda kiel kredanto al io ajn alia.

Jam de 2500 jaroj filozofoj scipovas el primara evidento logike dedukti korolarion. Sed nun oni scias, ke ekzistas neniu primara evidento. La nura afero, kiun oni scias kun certeco, estas, ke nenion oni scias kun certeco.

Konsekvence, la nura efektive racia sinteno estas kompleta nihilismo. La mondo estas absurda kiel teatraĵo de Beckett, aŭ kiel skeĉo de Raymond Devos.

Sed homa psiko estas tia, ke absurdon ĝi ne eltenas. Por eviti angoron, oni povas :
- aliĝi al jam ekzistanta religio
- inventi propran religion
- el la scienco mem fari religion.

Neniu el tiuj tri sintenoj estas malpli absurda, ol la du aliaj.

La tria sinteno estis tiu de Kartezio, Thomas Paine aŭ Auguste Comte.

Estante nek pli nek malpli absurda ol miaj gekamaradoj, mi diigas la amon. De post mia eksiĝo el la katolika eklezio, mi longe restis eksterekleza. Sed antaŭ kelkaj jaroj mi rimarkis, ke la religio, al kiu mi memstare alvenis, similas tiun de la kvakeroj. Ĉar kunesti kun samideanoj estas pli plaĉe, ol resti sole, mi ĵus petis de ili, ke ili akceptu min kiel membron de sia asocio.

La raciadorantoj nomas sin mem liberpensantoj. Tio estas tolerebla absurdaĵo. Sed kiel reagi, kiam pro tio, ke anstataŭ diigi la racion mi diigas la amon, ili nomas min dogmemulo kaj reakciulo, kaj kontestas mian rajton aliĝi al laborista asocio ?

Ĉar pro kulturaj motivoj mi uzas la vorton "Dio" (kvankam ne laŭ la difino, kiun ĝi havas en PIV), miaj maljunaj kontraŭantoj supozas, ke mia intelekta evoluo ĉesis antaŭ la scienca pensmaniero. Ne, karaj maljunaj raciistoj : naskiĝis ses jarojn post la bombado de Hiroŝimo. La diferenco inter ni ne estas tia, kia vi supozas : estas mi, kiu rifuzas viajn dogmojn.

(1990/01/28)

---

Komuniko de la Liberpensula Frakcio de SAT :

La liberpensula frakcio de SAT intencas eldoni tradukon (de kdo Valo) de klasika verko **"Kial mi fariĝis ateisto?"** de Andreo Lorulot. Tiu ĉi estis nelacigebla propagandisto en Francio, dum multaj jardekoj, de batalo kontraŭ ĉiuj formoj de klerikalismo. Oportunas, ke ekzistu verkoj de li en Esperanto.

Por aperigi tiun verkon, necesas ke la liberpensula frakcio investu 3000 FF. Do, ni lanĉas alvokon por ke vi kontribuu malavare al tiu monpeto. Ni bezonas vian helpon! Sendu monkontribuojn al : Suzanne Calas, 27 Cathalo, F-81270 LABASTIDE ROUAIROUX. Poŝtkonto 3 576 85 E Toulouse.



J. DEKER :

# PLUE PRI ANGLA LINGVO

Neniu atendis la konsilojn de Jakelino por lerni la anglan lingvon, eĉ inter la Esperantistoj. En la nuna stato de la mondo tiu lingvo nepre necesas por la sciencistoj, la fakuloj, la diplomatoj, la aviadistoj ktp... Jes ja, estas homoj, por kiuj nepre necesas internacia lingvo, tiom longe kiom Esperanto ne estos pli disvastigita, pli uzata estos la angla lingvo, kiu havos tiun rolon.

Por fremdulo legi kaj skribi la anglan ne estas pli malfacile, nek pli facile ol iu ajn lingvo. Tamen, pro sia disvastiĝo ĝi entenas tre riĉan vorttrezoron. Per laboro oni povas akiri ĝin, ne en 6 monatoj, sed post pluraj jaroj da studo, kaj tiam oni povas legi kaj skribi ĝin tute flue.

La malfacilaĵoj komenciĝas, kiam oni provas paroli ĝin, sed tiu malfacilaĵo estas relativa, ĉar la vera problemo estas kompreni ĝin kiam oni aŭdas ĝin. Al tiu problemo estas kvazaŭ nenia rimedo krom vivi kaj multe studi, strebi, aliel vi povus resti 25 jarojn en tiu medio sen mastri la lingvon. La malfacilo devenas de la fakto, ke la anglaj vokaloj kaj aliaj literoj (ekz. **th**) ne havas fiksitajn sonojn. Aldonu al tio, ke ofte duono de la vortoj estas glutataj. Ni estas for de la klareco de la germana kaj aliaj lingvoj. El tio rezultas ke parole ne estas ununura angla lingvo, sed multaj, kvazaŭ tiom multaj kiom da parolantoj. Tiuj, kiuj vojaĝis, povis konstati, ke la lingvoj parolataj en Usono ne estas la samaj kiel tiuj uzataj en Britio kaj malsimilas al tiuj uzataj en Aŭstralio, Sud-Afriko, Hindio ktp... Se iam tiu lingvo estus komune uzata en Eŭropo, estus alia speco de angla, verŝajne tiu de Germanio, kiu estus uzata. Sed kia laboro por la Eŭropanoj! Kvankam la angla lingvo parolata de fremduloj estas multe pli facile komprenebla.

Tie ĉi, en Maŭricio, oni uzas francan aŭ kreolan lingvon hejme, multaj uzas ankaŭ hindan dialekton,

kiun ili nomas Boĝhpuri, ĉiukaze ĉiuj scipovas la kreolan. Ekde la komenco en lernejo ili nepre studas ambaŭ francan kaj anglan lingvojn kaj ili havas facilecon por studi la hindian. Ĝenerale kapablas kompreni perfekte la anglan parolatan lingvon nur tiuj, kiuj vivis aŭ studis multajn jarojn en la angla mondo.

Certe oni povus, se la politikistoj volus ĝin, enkonduki la anglan pli facile en Francion. Sufiĉus dungi angle parolantajn instruistojn, kiuj instruus tiun lingvon kiel oni instruas fremdajn lingvojn al "Peace Corps". Tiel estus : ili instruu intensive simplan ĉiutagan lingvon al lernantoj ĉ. 10, 11-jaraj, kiam ili jam scipovas legi ktp... Dum unu jaro por trejni iliajn orelojn kaj instrui la unuajn elementojn de tiu lingvo. Poste ili instruu la diversajn temojn, rekte anglalingve, estu ankaŭ lecionoj pri angla lingvo, redaktado, kompreneble. Tiam oni povus esperi, ke la lernantoj havus jam bonan konon pri tiu lingvo, kiam ili atingas la abiturientan nivelon. Nun, almenaŭ en Francio, la instruisto aŭ la profesoro mem ne scipovas la anglan, kiun li instruas. Mi renkontis iujn, kiuj ne kapabli eĉ legi libron en tiu lingvo. Nur ĉe la universitatoj estas anglalingvuloj, kiuj profesoras. La Ministro pri Publika Instruado proponas al la francaj lernantoj, niaj idoj, studi 2-3 fremdajn lingvojn, kiujn la plejmulto neniam scipovos. Mi ne konas la staton de la afero en aliaj eŭropaj landoj, sed estus interese koni ĝin.

Konklude, lernu la anglan, se vi nepre bezonas ĝin. Tiam estos du kazoj : aŭ vi diros kiel mia edzino kaj mia filino : "Mi konas ambaŭ lingvojn, sufiĉas al mi", aŭ kiel mi : "Mi bezonas la anglan lingvon kaj mi scipovas legi kaj skribi ĝin, sed mi preferas Esperanton". Ĉiukaze la politikistoj nenion decidis ĝis nun, ĉiuj dezirus trudi la propran nacian lingvon. Ne estas por morgaŭ la eŭropaj unuigitaj ŝtatoj, eble intertempe ajna granda nacio (Ĉinio, Sovetio...) interesiĝos pri Esperanto...?



***Meva Maron :***

## KATIDON KADRAS TABURET'

*"Ni ne tro gratulu kaj danku al Kribo pro la necenzurado en Laŭte" skribis k-do Deker en n-ro 85. Mi konsentas : kunlaboro laŭ principo "ĉion aperigi" ja postulas certan takton, oni devas iel senti, kiam - silenti!*

*Kaj inter Deker kaj Oksana mi komencas aŭdi dialogon de surduloj - do mi baldaŭ diros : "ĉit!"*

*Ankaŭ mi, kiel Oksana, estas naciisto (espereble ne en stalinisma popolpaŝtisma senco!), mi subtenas vaskojn kaj bretonojn, kimrojn kaj irlandanojn... Ne protekti etnaciojn en muzeoj ("protokulturojn"), kiel ŝajne Deker volas, sed lasi ilin vivi! Mi subtenas ĝenerale malgrandajn naciojn, ĉar laŭ mi tro granda ŝtato (angla? franca?) nepre subpremas. Ne nepre homajn rajtojn - sed homan* ***kreemon.*** *Simple oni pli diverse rolas inter miliono ol en kvindekmiliona amaso - pri detaloj legu mian "Per vost' ekkapti rubekolon" en "La Gazeto".*

*Mi konscias, ke ne ĉiuj gelaŭtuloj samsentas. Sed frazoj kiel "ne estas unuigo, estas divido, apartigo" aŭ "progreso estas evoluo" ne defendas l'imperiismon de k-do Deker, ne konvinkas min repensi pri l'propra sinteno - sed sonas kiel sloganoj por konsole luli samideanojn...*

*Dum Lanti* ***argumentis.*** *Iam ankaŭ mi broŝurojn legis, multe malkonsentis - sed* ***respektis*** *lin, li* ***penis*** *min konvinki, ne gurdis...*

*Nu, sufiĉe. Mi konscias, ke mi ne konvinkis k-don Deker (kiel li verŝajne ne konvinkos min), precipe ĉar mi estas ulsteranino, do neniu kredus se mi "raportus el paradizo" de malgranda (miliona, kiel la baltaj) preskaŭŝtato...*

*Surtable kuŝas du poemoj. De Seán Ó Ríordáin, granda irlandlingva poeto. Unu temas, ke frenezulejo ne akceptis lin. Mi komencas skizi tradukon de l'alia :* ***"Katidon kadras taburet'... el bruo fuĝis al silent'... senmove timas sen event'... "neplenkatida" katidet'... sufiĉus vort' al Orient'...***

*sed ne komprenas Okcident': bonvenas agoj, ne kviet'... necesas mia interpret'..." Oriento kaj Okcidento : tian distancon mi vidas inter Oksana kaj Deker.*

*Meva Maron*

PS. Pri scienco kaj la Blankmara Kanalo k-do Deker pravas ke la KGB de la 70-aj jaroj disponis pli science altnivelajn (psikajn) rimedojn ol la kompatinda GPU de la 20-aj kaj 30-aj... Nu? Necesas pensi ankaù pri **celoj**, sciencon oni ja kutime misuzas...

PPS. Flue legi lingvon - kiom tio signifas? Eble mi mem diris (en malsaĝa momento!) ion tian pri la franca : mi ĵus nombris francajn librojn sur la bretoj, preskaù cent - do centojn da paĝoj jare ankaù mi (se mi legis!). Sed - mi ĵus revenis post internacia konferenco (kaj malfermis Laùte, esperante min malstreĉi super Ergoto!) dum kiu mi multfoje aùdis belajn francajn voĉojn (jen france parolantaj, jen angle, same belege - malfacile, eĉ distingi, kiun lingvon!) kaj - ne venis en la kapon franca vorto! El dek milionoj legitaj, el ĉiuj kiuj foje vagas tra la kapon dum la francoj mem forestas... Mi balbutis ion honte en mizera angla...

***********************************************************

**Marcelo L. :** Estas neĝuste, aù eĉ malĝuste, ke Edmund T. Grimley Evans mistifikas la ne-lingvistojn per nevero kiu estas preskaù malvero (Laùte 85, p.16, "Enigmeto por ne-lingvistoj"). Fakte estas malmulte da signifdiferenco inter "nehavigebla" kaj "malhavigebla". La granda malsimilo interas nur inter "nehavigebla" kaj "ne-havigebla" (aù "ne havigebla, aù "havigneebla"), same kiel inter "malhavigebla" kaj "mal-havigebla" (aù "havigmalebla"; komp. "kormalsana" anstataù "mal-korsana"); (la celo de la necesa dividstreko ja estas rompi la regulon ke ĉe kunmetitaj vortoj ĉiu parto priskribas, determinas, la tuj sekvantan parton).

***********************************************************

"La maljunuloj emas doni konsilojn,
tial ĉar ili ne plu kapablas doni
malbonajn ekzemplojn."

**Volter**



**Petro JAYER**
(Mauthausen, m-ulo 138044)

# Jes, Esperanto estis tiam ege danĝera lingvo !

E. Dazun : K-do Lentaigne kaj mi mem komunikis al Petro Jayer paĝojn, kiuj lin koncernis, el la fama libro de Ulrich Lins **"La danĝera lingvo"**. Jen lia respondo publikigata kun lia konsento.

Iom ŝokas min la tro rapida rakonto koncerne la okazaĵojn en Aŭstrio dum la lastaj jaroj de la milito 1939-45. Mi bedaŭras, ke la aŭtoro, kiu citas min kiel atestanton de la tragika morto de Gustavo Weber (rakontita en **Sennaciulo)** ne klopodis kontakti min, mi estus povinta komuniki al li kelkajn detalajn informojn pri la kaŝa aktiveco de Vienaj esperantistoj dum la Hitlera regno. Danĝera sinteno kaj kuraĝa entrepreno sekrete kunveni por praktiki Esperanton, prepari la estontecon...

Oni scias, ke Gestapo arestis Weber kaj min mem okaze de preparado de venonta kunveno, en lia propra hejmo. Post kelkaj monatoj pasigitaj en malliberejo ni ambaŭ estis senditaj al koncentrejo de Mauthausen. Enirejo de tia fortikaĵo estis unudirekta (senelira), tio egalis mortkondamnon! La malfeliĉa G. Weber ne eltenis la inferajn vivkondiĉojn faritajn de SS-anoj al la mizeraj malliberuloj kaj post mensa deliro en ege malbona fizika stato li estis murdita per ŝovelilo...

Post nia arestiĝo ĉiuj geesperantistoj estis kunvokitaj ĉe Gestapo sed feliĉe konsiderataj kiel naivaj sendanĝeruloj post promeso ne plu uzi la juddevenan malpermesatan lingvon, ĉesis renkontiĝi ĝis fino de la milito.

Se oni asertas, ke la libro de Ulrich Lins estas kvazaŭ "historio mem de la SAT-movado", oni agnosku, ke tiu historio ne estos kompleta tiom longe kiam oni ne rakontos, ke dum la Nazia teroro juna SAT-ano kuraĝis viziti sekrete N. Bartelmes en Düsseldorf, kie li tiam loĝis ĉe sia patrino, portanta al li mesaĝojn el SAT-centro en

Parizo kaj reciproke, ke la sama SAT-ano kune kun alia junulo, ĵus lerninta E-on kaj sendita por deviga laboro al Aŭstrio, konstante surportis la verdan stelon, ĉeestis la kunvenojn tiom danĝerajn de la aŭstrianoj. Post arestiĝo kuraĝis ankaŭ deklari al Gestapo, ke li sciis ke Esperanto estis iniciatita de judo kaj malpermesata, ke lia korespondado kun germanaj esperantistoj kaj francaj el la Pariza SAT-rondo kiuj sendis informojn, precipe vi kara Dazun kaj Paŭlo Meyer, estis cenzurita kaj ke ĉio tio kaŭzis lian kondamnon kaj tiun de G. Weber.

La alia juna SAT-ano, kiu bonŝance eskapis la arestiĝon, ĉar li ne ricevis de lia laborestro permeson por veturi al Vieno tiun fatalan tagon, nomiĝas Rolando Grandière. Ni ambaŭ estis 22-jaraj tiuepoke. Ĉu temas pri simpla banalaĵo ? Tamen neniu sin konsideras heroo! Se la milito estus daŭrinta kelkajn monatojn pli, certe Gestapo estus traserĉinta ankaŭ en la Parizaj rondoj de niaj korespondantoj, kaj nenia dubo, ke en la SAT-ejo la tiamaj kuraĝaj gekamaradoj, kiuj tie kaŝe aktivis, estus arestitaj. Kia sorto estus al ili rezervata? Oni ĝin imagas facile! Likvidataj pro praktikado de la malpermesata "danĝera lingvo", ne pardonebla krimo dum la Hitlera regno!

Ni estas kelkaj, kiel mi, por memori, ĉar la ŝanco volis, ke ni tamen postvivu. Sed nun tiuj tempoj jam de longe forpasis, venas la epoko de la "historiistoj"". Multaj nenion travivis el tio, pri kio ili skribas. Pri la eventoj ili ĉerpas el libroj, arkivoj, aŭskultas onidirojn, ktp., forgesas pridemandi la aŭtentikajn atestantojn...

Kiam mi legas en la lasta **S-ulo** la programon de la venonta SAT-kongreso en Linz (Aŭstrio), mi malkovras, ke oni ekskursos al ĉarma urbeto kuŝanta ĉe Danubo, posedanta interesajn vidindaĵojn, idilia loko por malstreĉiĝi kaj ripozi! Nenia vorto pri la mondkonata murdejo, kiu misfamigis tiun urbon **Mauthausen**, ĝia ŝtonminejo kaj gasĉambro, pri la esperantistoj, kiuj kun centmiloj da viktimoj el tuta Eŭropo ĝemis, suferegis kaj mortis tie. Tamen instalaĵoj, inkluzive de muzeo, estas viziteblaj.

Nuna plej fama persono de Aŭstria registaro estas eksnazia oficiro Kurt Waldheim. Ni volas esperi, ke la OKK



de la Kongreso ne petos de li akcepti la honor-prezidantecon de tiu manifestacio en Linz. Se tio estus, s-ro K.W. tre honorus la geesperantistojn maltrafante solene la malfermon!...

**********************************************************************

***Oksana :***

## Glasnosto :
## MALPLENIGADO DE TIRKESTOJ

*"**El tirkesto**", "**El duonforgesita heredaĵo**" - tiaj novaj rubrikoj aperis sur paĝoj de l'ukraina (ensovetia) gazetaro en la epoko de Glasnosto (nekaŝado). Nu, estus pli juste paroli pri "forgesigata heredaĵo", ja ĉio ebla por forgesigi ĝin estas farata dum la stalinista epoko kaj dum t.n. "stagna periodo" (kiel oficiale nomiĝas nun la regad-epoko de Breĵnev).*

*Kio do troviĝas en malplenigataj tirkestoj? Kompreneble, manuskriptoj, ankoraŭ neniam aperintaj, aŭ verkoj, kiuj ne aperis en Ukrainio dum jardekoj. Ne temas sole pri verkoj de malpermesitaj aŭtoroj (kaj tiaj estis dekoj!), sed ankaŭ pri tiuj de tute estimataj klasikuloj de "l'ukraina **sovetia** literaturo", kies verkojn oni studas en ĉiuj mezgradaj lernejoj de Ukraina SSR. Evidentiĝas ke ankaŭ klasikuloj "pekis", kaj ne ĉio el ilia verkaro troviĝas en t.n. "Plenaj verkaroj". Ankaŭ en verkaro de vaste konata poeto Volodimir Sosjura, laŭreato de diversaj plej honorigaj ŝtataj premioj, mankis kelkaj gravaj verkoj. Lastatempe revuo "**Kievo**" tiris el tirkesto aŭtobiografion de l' poeto ("La Tria Roto") kaj poemon "Mortpafita Senmorteco" kaj publikigis ilin. La poemo rakontas pri sorto de dekoj da verkistoj - viktimoj de l'stalinista teroro de l' tridekaj jaroj. Dekoj da nomoj - ukrainaj, belarusaj, judaj... Ne hazarde la poemo estas titolita "Mortpafita senmorteco". V. Sosjura ne pereis, saviĝis. Kiel? - tion priskribas lia aŭtobiografio, sincera rakonto de tre sentema, sed ofte tute naiva, homo. Homo, kiu en sia malespero, skribis leteron rekte al Stalin : "**Vi estas mia sola savo kaj azilo.***

***Patro! Savu min!!!"*** *L'edzino de l'poeto kaŝe enmetis atestilon de psikiatro, kiu kuracis la persekutatan poeton, en la leteron. Kaj la "Sunsimila Patro" savis... Li sendis leteron kun mencio: "Reanigi en la partion. Kuraci." Tamen ne ĉiuj saviĝis tiele. 10 jarojn en ekzilo pasigis Ostap Viŝnja, rekonita ukraina humuristo; Oleksandr Dovĵenko, mondfama kinoreĝisoro, devige loĝis en Moskvo kaj eĉ ne rajtis viziti sian patrolandon, nek filmojn pri ukrainaj temoj fari. Bonega poeto Pluĵnik pereis en koncentrejo en Solovki (vidu poemojn en "LF"-116). Miĥailo Draj-Ĥmara - en Kolima. Multajn similajn, ofte korŝirajn, detalojn ekkonas nuna leganto de sovetia gazetaro.*

*Homoj retrovas sian historion, nefalsitan, doloran. Revenas centoj da nomoj, centoj da verkoj. Ŝoko, konsterniĝo, larmoj - kaj ĝojo. Ĝojo, ke veron ne eblas pereigi, ke justeco, eĉ tiom kripla, finfine venas. Ĉu povas tion kompreni sennaciisto, apartenanta al nacio, kiu ne travivis similajn kataklismojn, kies bibliotekoj ne brulis, poetoj ne pereis en punlaborejoj, verkoj de klasikuloj ne estis malpermesataj? Diras "Proverbaro Esperanta": "Sata malsatan kompreni ne povas". Bedaŭrinde, mi konstatas, ke tia situacio estas ofta ankaŭ en Esperantujo.*

*****************************************************************

**Ĵanseb :**

## DEK JAROJ POR SUKCESI!

Plej bonajn dezirojn por 1990!

Kaj inter tiuj deziroj, ke la esperantistaro konsciu pri tio, ke 1990 estas la unua de la lasta jardeko antaŭ 2000! la lasta rekta linio por sukcesi! Ne por venki, ĉar ne estos venkitoj, tio estos la sukceso de la tuta homaro!

Tamen, restas nur dek jaroj por sukcesi. Se la lingva problemo restas en la ombro, se la temo restas tabua, se oni perdas tempon kun utopia plurlingvismo en la lernejoj, nu la usonangla iom post iom iĝos laŭfakte LA internacia lingvo.



Se, male, oni laŭte parolas pri lingvoj kaj insiste petegas koheran solvon, kiu povas nur esti, ĝis nun, nia lingvo, tiu ĉi havas la plej grandajn ŝancojn.

Esperanto estos sukceso ankaŭ por anglalingvanoj, ĉar ankaŭ la angla estas minacata pro sia internacia rolo: en ĝi estas pli kaj pli da fremdaj vortoj, multaj francaj, cetere, kaj Britio perdus sian identecon eĉ pli ol la aliaj popoloj.

Ni devas do dum tiuj dek venontaj jaroj glatigi la vojon por esperanto: doni modernan bildon de ni al la publiko, montri niajn librojn, revuojn kaj kulturon, partopreni al la komerca cirkvito kaj havi koherajn respondojn al demandoj pri nia alfabeto, nia kulturo kaj niaj statistikoj.

Jam pli kaj pli la etoso ŝanĝiĝas ĉirkaŭ esperanto: Male al dek jaroj antaŭe, nun la plejmulto da Francoj aŭdis pri ĝi, la ridemuloj nun kritikas ĝin serioze, la kritikemuloj emas al pli objektiva informo, interesiĝas kaj eĉ komencas lerni la lingvon.

Oni jam disrompis muron, tiun meze de Berlino. Restas alia disfaliginda, meze de la homa penso, tiu de la lingvoj : Esperanto estu la martelo, kiu disrompos ĝin!

********************************************************************


*Daŭrigo de p.2*

*Ordinara homo ne toleras tion, kio estas granda. Li provas kapti ŝajnan liberon kaj, kiam li sukcesas, li rapidas rekrei novajn limojn.*

*Realeco estas do, ke ni vivos ĉiam en difinita lando. Ni provu ami nian patrion tia, kia ĝi estas, sen permesi tiranismon kaj forĵetante ĉiajn malvastajn sentojn pri ekstrema naciismo.*

*Tiam, kaj nur tiam, ni povos pensi pri universaleco kaj kuniĝo de l'popoloj. Sennaciismo signifas amon al ĉiuj. Ĝi povas efektiviĝi nur kondiĉe, ke oni komencu ami konvene sian propran landon.*

***Edgard JAMART***



# EŬROTUR 90
# MILITRIFUZA BICIKLADO

La 3-an de aŭgusto 1990, militrifuzantoj el diversaj landoj ekbiciklos de francia urbo Lille por atingi Berlinon la 1an de septembro. Tiu biciklado esperas kunigi militrifuzantojn kiuj oriente kaj okcidente kontraŭstaras misefikojn militismajn. Ni montros tra Eŭropaj landoj nian komunan volon konstrui pacan estontecon en pli justaj socioj. En ĉiuj etapurboj, lokaj pacmovadoj preparos programon por pritrakti temojn rilate al militismo. Ili okazos ĉu per surstrataj manifestacioj, ĉu pere de ĵurnalistoj.

Ni rifuzas uzi la armilojn kaj servi la militajn instancojn. Ne kontribui estas unua paŝo sed plie ni kontraŭstaras armeon por instigi debatojn pri diversaj influoj de armea defendo sur la socion :

* **ekonomie**, armeaj budĝetoj estas pli grandaj ol la edukaj aŭ porsanaj. Aliflanke, ĉiam pli multnombraj homoj malsatas mondskale, eĉ interne de riĉaj landoj.

* **mensa influo** : naciismon oni konservas por sentigi utilecon de la armeo. Lernejoj celas prepari bonajn soldatojn ... por kia spirita disvolviĝo?

* Militema socio malfavoras demokratian progreson. Tion atestas civila servo alternativa al deviga militservo. Ofte ĝi estas maljusta, kaj ĉiukaze, ĝi malebligas kreon de opozicio al milita potenco. Kio pri la rajto diversopinii kaj egaleco de ĉiuj laŭleĝe?

* Militeca pensmaniero ankaŭ politike : Nuntempaj ŝanĝegoj en orienteŭropaj landoj povus malaperigi antagonismojn inter la du blokoj. Ĉu okcidentaj landoj solidariĝos kun naskiĝantaj demokratioj? Ni povas timi ke pro ekonomiaj kaj militaj zorgoj, riĉaj landoj klopodos ĉefe ekspluati tiujn novajn merkatojn.

Ni ne kredas, ke armeoj garantias pacon. Konsciaj pri misefikoj kiuj rezultas el militaj elektoj, ni agas sur pluraj



kampoj : malarmado, alternativoj al armea defendo, ekologio, pli justaj rilatoj kun la tria mondo... Dum Eŭrotur 90 ni postulos veran rajton rifuzi armeon, ĉar ni opinias ke armeo ne estas "necesa malbono". Ekzistas alternativoj! Ni biciklos por dissemi tiun internacian mesaĝon, por evoluo de la paco.

Ideojn kaj subtenojn bonvolu sendi al :
S.C.I. : Eŭrotur 90, 129 rue du Fg. Poissonnière,
F-75009 PARIS

****************************************************

## NIA KRIMINALA FELIETONO

La 15an de junio 1989, ĉe la 403a artileria regimento en Semoutiers (Francio) Manuel Perier rifuzis preni pafilon. Ĉar la ordonon li ricevis dufoje, li faris du rifuzojn. Do li estis akuzita pri 2 rifuzoj. Juĝita la 5an de julio kaj la 20an de aŭgusto, li estis kondamnita al 6-monata mallibero, kaj poste al 2-monata mallibero kun prokrasto.

La 20an de novembro li liberiĝis. Sed oni denove arestis lin kaj kondukis lin al kazerno en Dijon, kie li triafoje rifuzis porti pafilon. Do trian fojon oni juĝis lin. Oni kondamnis lin al kromaj 3 monatoj, kaj pro tiu kondamno nuliĝis la prokrasto pri la antaŭa kondamno al 2 monatoj.

Malgraŭ ke lia patrino estas kripla, la ministerio pri justico ĵus rifuzis lian peton pri kondiĉa liberigado. Do Manuel devos esti libera fine de aprilo... se neniu armeano atendos lin denove ĉe la pordo de la malliberejo!

Ĉu estas juste puni la saman homon trifoje pro la sama sinteno? Tiuj, kiuj opinias, ke tio ne devus esti, skribu :
- al la ministro pri justico : Monsieur le Ministre de la Justice,
13 place Vendôme, 75042 PARIS Cedex 01, Francio
- al la ministro pri armeo : Monsieur le Ministre de la Défense nationale, 14 rue Saint-Honoré, 75997 PARIS Armées, Francio
- al Manuel : Manuel PERIER, Maison d'arrêt, 72 rue d'Auxonne,
21000 DIJON, Francio.

Manuel ankoraŭ ne komprenas Esperanton, sed interesiĝas pri ĝi.

****************************************************************

**Malfeliĉas la lando bezonanta heroojn!** B. Brecht

## IOMETE PRI AMO KAJ AMORO

La titoloj de miaj du lastaj kontribuaĵoj komenciĝis per la adverbo "Iom" kun la aldono de "et", nome "Iomete", kaj la popola saĝeco certigas, ke ne ekzistas du sen tri. Tial la titolo de tiu ĉi artikoleto komenciĝas same.

*Amo estas Fundamenta vorto. Ĝi rilatas do al ĉiuj amoj: al la gepatroj, al la gefiloj, al la amatino, t.e. sekse ami kc. Pro tio D-ro Zamenhof uzis "amvendistino". Sed poste estis oficialigita la vorto "Amoro", Dio de amo, kun la aldono de la signifo sekse ami. Memsekve, se nia Majstro troviĝus ankoraŭ inter la vivantoj, tutcerte li uzus senhezite la esprimojn "amorvendistino", "amorvendejo" ks., kiuj estas pli ekzaktaj por diferencigi la du "amojn", eĉ se multfoje amo kaj amoro kunfandiĝas.*
*Sed ĉi tio fariĝas tro komplika, tro sofisma, eble paralogisma. Tamen ni iru al la kerno de la afero.*

*Mi amas Marian. Por mi ne ekzistas alia virino pli ĉarma, pli alloga, pli bela ol ŝi. Ĉar mi amas ŝin, mi deziras esti apud Maria la tutan tagon, pasigi kun ŝi la tutan vivon kaj, kompreneble, havi seksajn rilatojn kun ŝi, havi filojn de ŝi, filojn de tiu amo, kiu kunfandiĝas kun amoro, tiujn filojn, kiuj estos produkto de tiu granda, tiu profunda amo...*


*Tamen okazas, ke tiu Maria estas enamiĝinta al alia viro, al iu Johano, kaj ŝi sentas rilate al li same kiel mi sentas rilate al ŝi.*

*Nu, se mi* **vere** *amas Marian, mi devas helpi ŝin por ke ŝi konkretigu tiun amon, kiun ŝi sentas al Johano, eĉ se mia kor'malsaniĝos pro doloro. La vera amo ne serĉas la propran feliĉon sed la feliĉon de la amat(in)o.*

*Ĉu vi, gelegantoj, kapablos agi tiel ?*

*Afablajn salutojn al ĉiuj gelaŭtuloj!*
**A. Lopez Luna**





# LETERO (J) EL NIA MUELEJO

*Sabaton, la 25.11.89*

### LA BOVINOJ, LA TRAKTORO KAJ LA ŜTIPOJ

La muelejo, aŭ pli ekzakte ties malantaŭa kampo, regalas la bovinojn de Pjero. La karaj remaĉulinoj tie ĝuas la lastajn verdajn frandaĵojn, postlasitajn de longa kaj aparte seka varma sezono. Dankema pro tiu senpaga gastigado ankaŭ Pjero hodiaŭ venis por helpi. Sed ĉu vi konas Pjeron ? Li reprezentas la puran tipon de la sud-okcidenta kampulo. Pjero estas nia najbaro. Per lia traktoro kaj ties ĉaro ni transportas la ŝtipojn el la foraj bienpartoj, kaj kunigas ilin proksime de la muelejo. Grava lignoprovizo, por trapasi la malvarmajn momentojn de l' venanta vintro.

Ni apenaŭ efektivigis tri aŭ kvar transportadojn, kiam el la transkampa vojo la preterveturanta poŝtisto ekkriis: "Pjero, kelkaj el ciaj bovinoj forfuĝe sekvas la rivereton aloriente. Ili libere baldaŭ atingos la proksiman vilaĝon." Kompreneble Pjero devas tuj iri rekapti siajn malfidelulinojn, kaj antaŭ ol foriri li demandas, kiu dum lia foresto stiros la traktoron. Kaj ĉiuj rigardoj "nature" sin turnas al... mi!

"Jes, nature - akcente rimarkigas Kribo - nek Gastono, nek Ljo, nek mi posedas la stirpermesilon." Mi ? Sed mi neniam kondukis tian maŝinon. Nu, mi!

Antaŭ ol grandpaŝe postkuri siajn fuĝantinojn, Pjero duonmaĉas al mi rapidajn instrukciojn :

"Vidu 'stas simple : jen l'unua rapidumo, tie l'dua, ĉi tie

l'tria kaj tie ĉi l'kvara. Nur tion kroman ne faru."

Kelkajn minutojn poste la ĉaro estas plene ŝarĝita. Ek al... Mi proponas al Sabrina, mia kvaraĝa filino, stari apud mi. Ŝi ege ĝojas, triumfas ! Mi, tute ne. La motoro ekmuĝas, sed miaj unuaj provoj ekveturi restas vanaj. Ankaŭ la sekvantaj. Nun mi ĵus faris, kion Pjero kontraŭindikis al mi. Kaj apud mi Sabrina petole fieras, la aliaj pacience atendas. Mi ja ne devas montri mian maltrankvilon, plian senkompetentecon. Nun per ambaŭ manoj sur la rapidmŝanĝilo kaj... jes, la traktoro ekmoviĝas... sed retroen. Tuj mi reŝanĝas tion, kion Pjero zorgeme malkonsilis al mi kaj nun antaŭen eĉ se malrapide... ĝis la amaso ĉe la muelejon.

Ve! Jam post kelkaj metroj Ljo, Kribo kaj eĉ Gastono, kvankam trankvile piedirantaj, preterpasis nin, la veturantojn. Mi nepre devas funkciigi la duan rapidumon... ho! facile! eĉ la trian! Tamen sufiĉos, ĉu? La parkado laŭ la lignostokejo ne tro malbone okazas. Fine memfido gvidas min iom pli kaj dum la ceteraj kampotraveturoj mi eĉ ĝuos certan plezuron. Ĝis kiam ni interparolas pri atingo de loko, kiu necesigos nepran manovron... hum... hezito. Feliĉe nun revenas Pjero akompanata de siaj kunulinoj. Savita.

Sekvas ankoraŭ du aŭ tri ŝarĝ- malŝarĝ-epizodoj, kaj jam eknoktiĝos. Pli ol du metrojn alta ŝtipstoko fiere staras laŭ la kanalo apud la muelejo. Nur etapo. Laŭformata dispecigo restas laboro por muskoloj pli fortikaj ol la miaj. Nepra stadio antaŭ la fina plenigo de la forno.

Resume : **Dank'al bovilaj bovinoj mi aktore traktoris por ŝtipa ŝtopoŝtupo.**

Marcelo.

..........................................................................................

La Asocio de Francaj E-Fervojistoj okazigos sian jaran kongreson la 6.7. kaj 8ajn de aprilo en Kastelo de Bruguières (F-31150).
S-ro Alain TURENNE, 29 Le Castagné
F-31450 BAZIEGE



## CARGUE SAC, KIO ESTAS ?

Jen verŝajne la demando, kiu prezentiĝis al vi, kiam vi vidis tiun nomon unuafoje, sed eble ne kun la sama korpremo, ĉar laŭ tio, kion mi sukcesis scii pri tiu loko, ĝi estis la taŭga bieno, kiun mi bezonis por fini mian vivon. Nur unu ombro, sed unue tre grava por mi... Ĝi ne troviĝas en mia kutima agadcirklo. Do pro tio mi ne akceptis la proponon de nia kdo Kribo, kiu presigis tutpaĝan anoncon en **Laŭte!** pri miaj deziroj.

Sed mi ne trovis taŭgan solvon en la Pariza regiono kaj mi esploris la 5-provincajn proponojn jam ricevitajn, el kiuj nur tiu de Kribo plene taŭgis, malgraŭ la neankoraŭ pretigita ĉambro.

Mi decidis alveni en junio, sen antaŭviziti la lokon, sen ideo reveni al Parizo. Verŝajne mia letero atingis la lokon kun la forto de eksplodilo. Tuj Kribo, kvankam kontenta, provis limigi mian entuziasmon pri tiu nova, sed malfacila vivo, sed nescie pri mia obstinemo, pri mia jam planita vivo, almenaŭ laŭ kelkaj ĉefaj kondutlinioj. Fine li vizitis min kaj ni interkonsentis kun transportisto de Aĝeno, kiu decidis pri la dato. Nu, tiu dato estis tiu de mia naskiĝtago kaj mi komencis mian 72an jaron en Cargue Sac por inaŭguri mian novan vivon! Mi ne kulpas pri tio, estis nur hazardo, kiu prokrastis mian alvenon ĝis tiu dato. (Unue mi pensis alveni inter la 5a kaj la 10a de la sama monato junio).

La deciditan tagon, Kribo kaptis min en Parizo kaj zorgis pri ĉio. Tial mi vojaĝis en bona etoso, sen zorgoj kaj sen malfacilaĵoj. La sekvontan tagon, la veturilo liveris al ni la materialon supozeble uzeblan en Cargue Sac.

Pri la loko, ĝi estis proksimume laŭ la ideo, kiun mi havis pri ĝi. Nur unu surprizo : mi jam sciis, ke estis multe da mortintaj ulmoj, sed mi ne povis imagi ilin tiom grandaj kaj dikaj, ĉar en la Pariza regiono plej multaj estis nur rekreskaĵoj postmilitaj...

Gigantaj laboroj necesas por fari el la domaro akcept-

eblajn ĉambrojn por niaj vizitantoj, por transformi la terenon en agrablan parkon kun multaj aleoj. Malgraŭ la sekeco, mi kapablis rimarki kiel rapide kreskas la dornarbetoj post iom da pluvo.

Klarigi al vi la tuton ne estus facile, necesus nur scii pri mia tekniko por konstrui digon per la loka materialo: mi unue metis 3 aŭ 4 rangojn da brikoj en la pli malaltan parton laŭlonge de rivero "Seŭno". Ĉe la ekstera flanko mi faris kvazaŭ taluson el la gruzo ĉerpita el la rivero, poste mi alportis teron por plenigi la interan flankon (temas pri la promenejo, kiun mi pompe nomas "kornico de la Seŭno").

Ĉu vi opinias la laboron jam finita? Tute ne! Temas ja nur pri provizora sekureco. Poste mi forigos la sablon kaj la brikojn, anstataŭigos ilin per tero, kiun mi plilaltigos ĝis nivelo pli alta ol la ankoraŭ supozeblaj inundoj.

La ekskanalo estos freŝa, profunda vojeto por viziti la bienon de oriento al okcidento. La plej malnova parto, stranga kaj profunda kun multaj kurbaĵoj estos nur por la kuraĝuloj (mi nomas ĝin "la infero"). La reveno fariĝos sur la kornico.

Fruktoj abundas en tiu regiono. Ni mem havas ĉerizojn, prunojn kaj sovaĝajn pomojn grandkvante. Ni planas planti aliajn fruktarbojn... kiam la urĝaj laboroj estos... malpli urĝaj!!!

Gastono.

*************************************************

Lastminuta kaj pertelefona informo :

## E-TEATRO en FIGEAC ( Lot, Francio)

La 6an de aprilo, je la 15a, okazos prezentado de teatraĵo de Fernando Arrabal, "La Arkitekto kaj la Imperiestro" en FIGEAC, fare de la trupo de La Krizalido. Regionaj interesatoj sin turnu skribe al :
Arno Lagrange, La Vernoulie, F 46400 St Paul de Vern

*************************************************





# laŭtaj informoj

### MUZEO DE PACO KAJ SOLIDARECO EN SAMARKAND

Laŭ iniciato de lokaj E-aktivuloj en Samarkando fondiĝis publika Muzeo de Paco kaj Solidareco. En la Muzeo, situanta en la urbocentro, estas eksponataj diversspecaj pacpropagandiloj el pli ol 50 landoj de ĉiuj kontinentoj. La organizantoj de la unika Muzeo konstante kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn afiŝojn, sloganojn, pentraĵojn, infandesegnaĵojn, fotojn, insignojn, gluetikedojn, librojn, revuojn, lumbildojn, T-ĉemizojn, balonojn kaj ĉiujn ceterajn materialojn pri batalo de la popoloj kontraŭ militarismo, faŝismo, rasismo, novkoloniismo, por la paco, socia justeco kaj progreso. La Muzeo ankaŭ tre volonte akceptas dokumentojn kaj rememorojn de veteranoj-kontraŭfaŝistoj, leterojn de diverslandaj pacbatalantoj. Tiuteme oni korespondas en Esperanto, en la angla, rusa, uzbeka, laŭbezone ankaŭ en aliaj lingvoj. Bonvolu direkti ĉiujn kontribuaĵojn al :
Museum of Peace and Solidarity
c/o International Friendship Club
"Esperanto", P.O. Box 76
SU-703000 SAMARKAND, Uzbekistan.

### POR MEDIPROTEKTADO KAJ SANA VIVMANIERO

La Samarkanda Klubo de Interpopola Amikeco "Esperanto" (adreso ĉi-supre) kunlabore kun la urba societo por sobreco ĉiujare organizas la internacian ekspozicion pri la agado por la mediprotektado, sana vivmaniero, kontraŭ alkoholismo, drinkado, tabakfumado kaj toksuzado en diversaj landoj. Tiucele ni kolektas ĉiulingvajn tiutemajn afiŝojn, fotojn, desegnaĵojn, insignojn, gluetikedojn, poŝtkartojn, revuojn, librojn kaj ĉiujn ceterajn propagandilojn de la mediprotektado kaj sana vivmaniero. Ni korespondas tiuteme en Esp., angla, rusa, uzbeka kaj aliaj lingvoj.
Helpontoj ricevos laŭdezirajn memoraĵojn.

### DUA SESIO DE MONDA UNIVERSALA PAC-AKADEMIO EN OLSZTYN (PL)

Respondante deziron de partoprenantoj de la 1-a parto de sesio de Monda Universala Pac-Akademio, nia Rondo decidis aranĝi la duan parton en Olsztyn de la 27a ĝis la 29a de aprilo 1990. La prezo de partopreno je tritaga manĝado kaj tranoktado kostas :

| | |
|---|---|
| al la Poloj | 434000 zlotojn |
| al Okcidentanoj | 186 DM |
| al Orientanoj | 607 rubloj SU |

En la programo de kunveno oni proponas:
1. Daŭrigon de diskuto pri la temo : utiligo de amaskomunikiloj por popularigo de pactemoj (Ankaŭ utiligo de satelita televido).
2. Simpozion de aktivuloj de PEA kaj specialistoj de E-movado pri la kreado de plurisma estonteco de E-movado en Pollando kaj aliloke.
3. Partoprenon en la programo de Olsztyna Planedarejo s.t. "Ĉu stelaj militoj aŭ stela paco?"
4. Kulturajn kaj turismajn atrakciojn de la regiono.

La organizantoj planas eldoni referaĵojn de lekcioj. Pro tio ni petas plej frue sendi ilin al nia adreso :
Juliusz Wasik, Kaliningradzka 14/72
PL-10-900 OLSZTYN 2

### 23a INTERNACIA RENKONTIĜO NATURAMIKA (IREN)

... invitas naturamikojn, esperantistojn, amikojn de Esperanto al malgranda vilaĝo, ripozloko ABALIGET, en suda parto de Hungario 18-kmojn for de la dumiljara urbo PECS en montaro MECSEK.
Datoj: 1990 - 07 -14/23

La partoprenantoj loĝas en agrabla malgranda kampadejo kapabla akcepti 100 personojn sur ombra montodeklivo.
Riĉa programo atendas vin.
Petu aliĝilon al : IREN, Departementa Komitato de Hungara Esperanto-Asocio
Pf.2, H-7601 PECS

En nia gimnazio mi instruas E-on en oficialaj kadroj anstataŭ la ĝis nun devige instruata rusa lingvo, sed nur por 17 geknaboj en la unua klaso. Mi volonte aranĝus kontaktiĝon de miaj gelernantoj kun francaj e-istaj gejunuloj.
NZLUCSHIE KUCO-ROSZA
Tuldi U7, H-7626 PECS.

# HELPU AL NIAJ RUMANAJ GESAMIDEANOJ !

Jenaj esperantistoj bezonas materialan helpon por siaj E-kursoj aŭ grupoj aŭ por si mem :
(Disvastigu iliajn adresojn!)

| | |
|---|---|
| Julia SIGMOND<br>CP 200<br>R-3400 CLUJ-NAPOCA | (E-asocio) bezonas : E-(lerno)librojn, paperon, E-gazetojn, vortarojn. |
| Mihail Iulian DINCU<br>CP 9-38<br>R-72100 BUCURESTI 9 | (E-asocio) : E-(lerno)librojn, paperon, propagandilojn, insignojn, gluetikedojn, vortarojn, ktp. |
| Ernesto SCHLESINGER<br>str. Dr.P. Groza 22<br>R-3400 CLUJ-NAPOCA | E-gazetojn. |
| Ion SIRBU<br>bd. Lenin 92<br>sc.C ap.8<br>R-2200 BRASOV | (E-asocio) E-(lerno)librojn, E-gazetojn, paperon. |
| Ovidiu GORDEA<br>str. colectivistitor 13<br>bloc 4 sc.A et.2 ap.6<br>R-2200 BRASOV | (Studanto) : E-librojn, -gazetojn, -vortaron. |
| D-ro Gabor LAZAR<br>str. Stefan cel Mare 26/A<br>R-4055 COVASNA | (Kuracisto) : E-(lerno)librojn, vitaminojn, antibiotikojn. |
| Joan VAJDA<br>bd. dul Garü 30A<br>bloc 225a sc.B ap.18<br>R-2200 BRASOV 9 | Vestaĵojn por infanoj 6/14-jaraj. |
| Jenö ZAGONI<br>Jud. Covasna<br>R-4000 SFINTU-GHEORGE | Paperon, elektran skribmaŝinon. |
| Victoria Isabela POPESCU<br>str. Columbelor nr.7/op.1/Sector 3<br>R-70498 BUCURESTI 20 | E-materialon. |
| CHIREA Petre<br>str. Serban-Voda<br>Ne.100 Sector 4<br>R-70519 BUCURESTI | (E-asocio) : E-(lerno)librojn, nutraĵojn por infanoj, vestaĵoj por infanoj 1/4-jaraj. |
| Jolanda JOZSI<br>str. Patinoarului nr.12 sc.1 ap.3<br>R-4100 MIERCUREA-CINC | (E-instruistino, verkistino) : E-materialon (libroj, gazetoj, vortaroj), skribmaŝinon, stencilmaŝinon aŭ fotokopiilon. |

*****************************************************************************

**SAT-ana GRUPO EN SAPPORO (J)**
kreiĝis antaŭ kelkaj monatoj kaj ĵus eldonis la unuan numeron de sia bulteno "FRONTE". Adreso : MIYAZAWA Naoto, 1-3-13, Azabu, Kita-ku, SAPPORO, 001 Japanio.

Tiu numero estas tute dediĉita al la batalo de fervojistoj minacataj pro la projekto likvidi kaj privatigi JNF-on, la Japanan Nacian Fervojon.



**"KIU POSEDAS DANION?"**

estas libro de Lennart Weber, tradukita de Betty Larsen kaj ĵus eldonita de la Dana Laborista E-Asocio.
Ĝi informas pri la 108 plej grandaj konzernoj en Danio kaj kiel tiuj entreprenoj al si ligas enormajn interesojn en la dana socia vivo. Konkludas la tradukintino en sia "Antaŭvorto" : "Tio ĉi estas kapitalismo kiel socisistemo, batalo de ĉiuj kontraŭ ĉiuj. Ni bezonas kompreni la kapitalismon por forigi ĝin."
Prezo: 60 danaj kronoj. Mendojn sendi al Dana LEA, Edvard Griegs Gade 28, DK-2100 Kopenhago. Giro: 7 04 50 69.

************************************

**ESPERANTO EN PROSPEKTIVO**

estas esperantismologia studo verkita de nia amiko laŭtulo Giordano Moya Escayola kaj bele eldonita de Barcelona Esperanto-Centro, Carreras Candi,36
E-08028 BARCELONA
La aŭtoro analizas la penson de Zamenhof kaj ties idearon en rilato al la esperantista movado kaj konceptas ĝin kiel la portanton de ideo-forto kapabla ŝanĝi nian nunan civilizacion. Tiu bela libro iel kompletigas alian libron de nia amiko "La Homa Vivaventuro" eldonitan en 1987.
Prezo neindikita, supozeble ĉ. 900 pes.

************************************

**NOVA ESPERANTO-POŜTKARTO**

estas ĵus eldonita de Perigorda E-Grupo. Tre "klasika", ĝi prezentas sur malhele blua ĉielo stelaron, el kiu elstare brilas la verda stelo de Esperanto. Ĉiu ekzemplero : 2,50 FF (inkluzive de la sendkostoj)
Mendojn sendi al :
S-ano Byk, Le Suchet,
15 rue Pablo Picasso, F 24750 BOULAZAC

************************************

**"TERENO"** estas la nomo de simpatia E-bulteno jam de longe eldonata de la grupo en Toowoomba (Aŭstralio). Jam venas la 98-a numero! Dankon kaj gratulon al nia tiea laŭtulino Jean Lehane!

*************************************

**"Ju pli malhelas la ĉielo, des pli lumaj aspektas la steloj."**
Leonardo di Vinci

**ESPERANTO-MEDALOJ + MONEROJ**

estas 20-paĝa broŝuro kompilita kaj eldonita de Hans Jankowski, Am Wemphof 5 D-4600 DORTMUND 70
H. Jankowski jene prezentas : "Dum la lastaj jardekoj aperis multaj E-poŝtmarkoj kaj memorigaj poŝtostampoj. Malpli grandan atenton ĝuis la Esperanto-medaloj kaj -moneroj, kvankam ankaŭ ili sumiĝis al impona kvanto. En 13 ŝtatoj estas eldonitaj 30 diversaj medaloj kaj 8 moneroj memorigaj al Esperanto."
Kolektemuloj notu la aferon!

**********************************

**13a kaj 14a INTERNACIAJ E-SEMAJNOJ**

estas organizataj ĉi-jare de la Kultura E-Centro de Montpellier (Francio).
* La unua okazos en vilaĝeto Habère-Poche, en Alpoj, de la 25a de aŭgusto ĝis la 1a de septembro.
* la dua okazos ĉe mediteranea bordo, en havenurbo Sète.

La K.C. de Montpellier proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esp. (Ni havos 3-nivelajn kursojn kaj inicadon al pedagogio). Vi profitos samtempe por trapasi agrablajn feriojn ĉu en montaro ĉu ĉe marbordo, ĉu en ambaŭ lokoj laŭ via elekto.
Por ricevi pliajn informojn kaj aliĝi skribi al : ESPERANTO, 5 rue Dr. Roux F-34000 MONTPELLIER.

**********************************

**KUIRLIBRO**

Du germanaj amikinoj planas eldoni kuirlibron kun receptoj el la tuta mondo (supoj, legomoj, viandoj, fiŝoj, desertoj). Ili petas, ke oni klare skribu ĉar eble la tekstoj mem estos uzataj.
Antaŭdankas la geamikojn kiuj sendos respondon : Gisèle GIZARD, 39 avenue de Saint-Médard, F-33320 EYSINES.

**********************************

**ESPERANTO PER LA KATALUNA...**

La asocio "Amics de l'Esperanto", 72 av. Gral. de Gaulle, F-66000 PERPINYÁ, tion propagandas kaj uzas la broŝuron "L'Esperanto en 24 pagines", kiun ĝi mem reeldonos kaj disvendos. Car tiu ĉi broŝuro estas elĉerpita ĉe SAT-BS, sin turni al... Perpinyá!

## EKOLOGIO : RADIKALAJ ELEKTOJ FARENDAJ

Internaciaj konferencoj kaj sciencaj publicaĵoj multiĝas kaj samdirektas por anonci ekologiajn demandojn kiel ĉefan aferon de tiu finiĝanta jarcento. Ankaŭ ŝtatprezidantoj diskursas pri la mortdanĝero kiu minacas la planedon. Tamen bedaŭrindas ke politikaj decidoj tute malakordiĝas kun la alarmaj mesaĝoj...

En riĉaj landoj, popola konscio pri mediprotektaj problemoj iĝas tre forta, ĉar ĉiuj povas konstati kaj eksuferi la detruon de naturaj vivkondiĉoj. Konsekvence, ĉiuj politikaj partioj aldonis ekologiajn prizorgojn en siajn programojn kaj tiun temon oni multe pritraktas kiam proksimiĝas balotadoj. Tamen, neniu partio - inkluzive de la verdaj - faris la paŝon de mediprotektado al iu "ekologiisma pensmaniero". Fakte nia vivmaniero sur tiu ĉi planedo estas repensenda entute, kaj riproĉindas respondeco al liberalisma ideologio, kiu hodiaŭ havas novajn adeptojn eĉ en Varsovio, Budapeŝto aŭ Moskvo.

En t.n. "socialismaj landoj", produktivaj sistemoj kaŭzis vastegajn misefikojn kontraŭ la naturo, ĉefe en Sovetunio kie ekologio vekis la unuajn kontestemajn movadojn. Pro disiĝo inter asertoj kaj praktiko, S-ro Gorbaĉev altiris malfidon de ekologiistaj movadoj, kaj li ofte frontas kontraŭ ambaŭligitaj ekologiistaj kaj naciistaj postuloj.

Sed hodiaŭ la torĉo de produktiveco pasis triumfe al liberalistaj landoj. Triumfas ankaŭ la riĉnivelaj kontrastoj mondskale, kiuj rezultas de tiu ekonomia sistemo kaj nutras ĝian funkciadon. Nu, tiu pli kaj pli grava kontrasto kondukas al detruo de ekologiaj ekvilibroj, ĉar vivmaniero de riĉuloj - tiel en riĉaj kiel en malriĉaj landoj - fondiĝas sur senlima malŝparo de energio.

**La kuraĝo ŝanĝegi la ekonomion.**

Konstrui potencajn veturilojn estas krima lukso. Kiu kuraĝos leĝe malpermesi tion, puni la uzadon de individuaj aŭtoj por favori kolektivajn transportilojn?

Industria agrokulturo, per intensa konsumo de kemiaĵoj, intensivaj bredadoj, elsuĉas la grundojn ĝis neripareblaj efikoj. Laŭ ekologiisma perspektivo, agrokulturaj praktikoj ĉe nordaj landoj radikale ŝanĝiĝu.

Akra problemo rezultas ankaŭ de ekonomiaj rilatoj inter Nordaj kaj Sudaj landoj : plimultnombriĝo pro malriĉeco kaŭzas gravajn ekologiajn detruojn, kaj popoloj ĉie migras por fuĝi el dezertigitaj regionoj.

**Datlimo : 10 jaroj!**

Plimulto da sciencistoj asertas ke antaŭ 10 jaroj ŝanĝoj devas okazi mondskale por restarigi la ekvilibrojn necesajn al vivo sur tiu ĉi planedo : inter naskoj kaj mortoj, inter eligado kaj fiksado de karbono, inter erozio kaj firmiĝo de la grundoj, inter faligado kaj plantado de arboj...

Dek jaroj : tio estas mallonga tempdaŭro por politiko. Ne sufiĉas "verde farbeti" la politikajn programojn, ĉar neniel helpas, se la tuto ne samcelas. Mondskala projekto devas trudi decidojn al ĉiuj landoj, sendepende de iuj ajn financaj konsideroj. Ĉu ene de sennacia kaj tutmonda instanco ? Tio aspektas revolucia propono, sed ankaŭ tio estas bezonata kondiĉo por pluvivo sur la planedo.

---

*Kiel kontribuo al la ekologiista frakcio de SAT, tiu ĉi artikolo resumas artikolojn aperintajn en la monata franca gazeto "Le monde diplomatique".*
*Ĝi analizas la nuntempan situacion kaj ŝanĝojn farendajn mondskale por atingi ekologiisman politikon.*

*Jean-Marc Verger*

***

Ĵus aperis la unua numero de "Eko-Bulteno", organo de la Ekologiista Frakcio de SAT. Krom diversaj informoj pri uzado de E-o por ekologiismo kaj raporto pri la unuaj paŝoj de la Frakcio, "Eko-Bulteno" enhavas artikolon pri la situacio de Verduloj en Norvegio. Adreso: Cl. Rouget, Dramsv.112, N-9000 Tromsö



Antaŭ kaj post la ĉi-jara SAT-Kongreso :

## De la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto en Maria Alm (Aŭstrio)

Maria Alm. Feria paradizo en la aŭstria federacia lando Salzburg. Feria lando de vivĝojo, ripozo kaj trankvilo... Multspecaj pejzaĝoj de majesta beleco de la alta montaro ĝis mildaj montetoj kaj lag-regionoj bonvenigas la gastojn. Maria Alm, pitoreska monta vilaĝo, ĉe la piedo de la Ŝtona Maro (Steinernes Meer) kaj la Alta Reĝo (Hochkönig 2941m). La malnova pilgrima loko en unika bela regiono fariĝis ŝatata feria restadejo. Pro la favora altreco (800 m) kaj alpa klimato de la vilaĝo, ĝi estas rekoeco mendinda aerkuracloko kaj akiris internacian famon. La loko konservis la montvilaĝan karakteron kaj tamen ofertas modernan komforton. Oni povas migradi sur facile ireblaj vojoj meze de sunaj valoj, tra arbaroj, apud riveretoj kaj lagoj, aŭ pli streĉi la fortojn, grimpante sur montojn.
Pliajn informojn kaj aliĝilon petu de :
Max Finkenzeller, Troststrasse 27/10/2
A-1100 VIENO

## De la 11a ĝis la 18a de aŭgusto en Vieno

Post la SAT-kongreso en Linz (4./11.8.90) MONDA TURISMO invitas al postkongresa restado en Vieno por ekkoni la urbon kaj ties ĉirkaŭaĵon.
Programo : Vizito de la interna antikva urbo, Ringstrato kun ĝiaj monumentaj konstruaĵoj, kastelo Schoenbrunn, popolamuzejo Prater, danubinsulo, urba parko, prelegoj kaj filmoj. Tuttaga ekskurso tra la orienta federacia lando "Burgenland", ktp, ktp. Du duontagaj ekskursoj, unu al Kahlenberg, historia loko de la turka sieĝo de Vieno. Dua

ekskurso kondukas tra la plej bela danubvalo WACHAU, vizito de la impona baroka monaĥejo Melk, de tie ĉi ŝipvojaĝo sur Danubo al la pitoreska historia danuburbeto Duernstein. Atendos vin multe da ne forgeseblaj impresoj! Aliĝon vi certe ne bedaŭras.
Pliajn informojn kaj aliĝilon petu de :
Max Finkenzeller, Troststrasse 27/10/2, A-1100 VIENO

******************************************************




Ĝisdatigitan liston de disponeblaĵoj vi trovos en tiu ĉi n°. Ĝi estis starigita en januaro kaj jam modifiĝis intertempe!

**Ĵus aperis** (pro mendo de la Liberecana Frakcio de SAT):

**La Rezolucioj de la Kongreso de St Imier** - sep.1872" Temas pri maldika broŝuro (14-paĝa) sed signife grava por la laborista movado; eĉ nun "en la tempo kiam la ŝtataj monstroj starigitaj de la disĉiploj de Karl Marx renversiĝas mondskale, la rezolucioj de la Saint-Imier-kongreso montriĝas lumplene antaŭavertaj".
Mendkodo : RE. Vendprezo : 3 FF.

**Elĉerpiĝis** : AO, PT.

**Restas malmulte el** : DU, KD, NE, PF, RA, VI.

******************************************************

**la venonta numero aperos fine de majo**

******************************************************

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 LAROQUE. CPPAP n° 58651